


EL POPOLA ĈINIO

中國報道 1979 11







▲ Gravuritaj traboj kaj kolonoj ▼




Portreto de la imperiestro Qianlong kaj imperiestra memortabuleto en la hana, tibeta, manĉura kaj mongola lingvoj



Murpentraĵoj



Flugantaj feinoj



Ora krono supre de la Relikvo-stupaa Halo


Riparo




Dalai-lamao la Kvina inter-
vidiĝas kun la imperiestro
Shunzhi de Qing-dinastio.



Vivo de tibetanoj





Reordigo de sutraj verkoj

Vizitantoj

Ora botelo (donita de Qing-registaro en la jaro 1792)



LERTULO EN GREFTADO



Chen Jiping

Chen Jiping estas ordinara kamparano. En lia hejmloko Jingyan-gubernio de Sichuan-provinco, oni kutime plantas morusujojn kaj bredas silkraŭpojn. Antaŭe la kamparanoj faris bredadon per folioj de plantitaj morusujoj. Ili povis ekpluki morusfoliojn nur post 3-4-jara kreskado de tiaj arboj, kaj multe pluki nur post kvin jaroj. Kaj krome, la folioj estis maldikaj kaj ilia produktokvanto malalta. Por ŝanĝi tian staton, Chen Jiping komencis fari eksperimentojn en la jaro 1958. Li prenis plantitan morusujon kiel patrinan planton, sur kiun li greftis burĝonojn de alia bonspecia morusujo. Li faris 2-jaran provadon kaj fine sukcesis. Oni povas jam grandnombre pluki foliojn de la burĝongreftitaj morusujoj post unu-jara kreskado, kaj ilia produktokvanto de folioj estas duoble pli ol tiu de la negreftitaj morusujoj.

Chen Jiping faris eksperimentojn ankaŭ en greftado de juglandujoj. Li prenis plantitan junan juglandujon kaj acer-poplon (*Pterocarya stenoptera*) kiel patrinajn plantojn, sur kiujn li greftis branĉojn de bonspecia juglandujo, kaj ankaŭ akiris sukceson post multfoja eksperimentado. Antaŭe la plantitaj juglandujoj komencis frukti nur post 8-10 jaroj, sed nun dujara juna greftita juglandujo jam donas fruktojn.

La atingo de Chen Jiping en scienca esploro estis multe taksata de la popola registaro. Chen estis elektita kiel membro de la Asocio de Silkraŭpa Bredado de Sichuan-provinco kaj prezentis sian sperton de greftado en la tutlanda agronomia konferenco.



Konigo pri tekniko de burĝongreftado

Instruo al junaj komunumanoj pri prizorgado dum fruktodona tempo

Post greftado dujaraj junaj juglandujoj jam donas fruktojn.





Chen Jiping (maldekstre) kaj laborantoj de plantida kulturejo kune observas la vivadon de burĝongref-
titaj morusujoj.

Observado pri greftitaj juglandujoj





Burgongreftitaj morusuj kreskas prospere.

EL POPOLA ĈINIO

中國報道

1979
N-ro 11
(254)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Generala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Paŝtejo en Tibeto

BILDPAĜOJ:

1. KOLORA SERIO

Potala-palaco

2. NIGRA-BLANKA SERIO

Lertulo en greftado

3. KOLORA SERIO

Gardenoj de Suzhou

4. NIGRA-BLANKA SERIO

(1) Fotoj pri la Ĉina Esperanta Labor-kunveno

(2) Totemo en Loreno, Francio

Malnovaj muelejoj 15 km. norde de Amsterdamo, Nederlando

Malgranda plezursipo sur la rivero Rejno

5. KOLORA SERIO

(1) Fotografiaj verkoj de Chen Fuli

(2) Agrabla vivo dum la someraj ferioj

SUR LA DORSKOVRILO:

Senmova objekto (olepentraĵo) de CHEN NINGKANG

Enhavo

Komenco de la nova periodo	2
Ĉie abundas amikeco	5
Lingva diskriminacio — netolerebla maljustaĵo	8
Notoj pri vizito al Lhasa	9
Tibeta Aŭtonoma Regiono	15
Tian Han kaj lia dramo "Princino Wencheng"	16
La birdo de feliĉo	20
TRA ĈINIO: Suzhou — akvoriĉa urbo en Ĉinio	22
Pri la somera kampado en Qingdao	25
Pomologo Tao Zunhu	28
Instruistino el Mjaŭ-nacieca montregiono	30
En la gubernio de anasoj	32
Kiom da infanoj ŝi havas (Daŭrigo)	36
KALEJDOSKOPO:	
Kolombo-arboj en Ĉinio	39
Bredado de raraj animaloj en la regiono de Fanjing-monto	39
23 jaroj per kaj por Esperanto (Daŭrigo)	40
Kanto de 1' nigraj ministoj (poemo)	42
Al nigraj ribeluloj (poemo)	43
AMIKECO: Pikniko (en Jugoslavio)	44
KURANTAJ AFEROJ	46

Komenco de la Nova Periodo

— Pri la Ĉina Esperanta Labor-Kunveno

de NIA RAPORTISTO

DE la 27-a ĝis la 31-a de aŭgusto ĉijare, la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) okazigis en Beijing la Ĉinan Esperantan Labor-kunvenon. Ĝin ĉeestis 50 reprezentantoj el 13 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. La kunveno, duafoje okazigita de post la jaro 1963, speglis deziron

de la ĉinaj esperantistoj en multaj jaroj kaj markis la komencon de nova periodo de la ĉina Esperanto-movado.

Antaŭtagmeze de la 27-a de aŭgusto laborantoj de la redakcio de El Popola Ĉinio, la esperanta

Geesperantistoj kunvenas.



sekcio de Radio Pekino, la esperanta sekcio de Guozi Shudian kaj parto de esperantistoj de Beijing frue venis al la kunveno por bonvenigi la reprezentantojn de aliaj lokoj de la lando. Kiam la reprezentantoj eniris la kunvenejon, ĉiuj alpaŝis kaj reciprokis saluton. Inter ili troviĝis veteranaj esperantistoj kiuj sin ekokupis pri esperanta laboro en dudekaj aŭ tridekaj jaroj, kaj junaj esperantistoj kiuj komencis esperantan laboron en sesdekaj aŭ sepdekaj jaroj. Ili estas profesoroj, verkistoj, inĝenieroj, sciencaj laborantoj, respondeculoj de la partiaj kaj registaraj departementoj kaj ordinara laborantoj de kultura kaj eduka branĉoj. Multaj el ili ne interkonatiĝis antaŭe, sed kiam aŭdiĝis "saluton", ili tuj eksentis intimecon sperteban dum renkontiĝo de karuloj neviditaj dum longa tempo. Antaŭ la komenco de la kunveno, la reprezentantoj kun granda intereso rigardis la montritajn en la kunveno esperantajn librojn kaj gazetojn de pli ol 300 specoj eldonitajn en kaj ekster la lando, kaj fotojn pri la Ĉinaj Esperanto-Delegacioj al la 63-a kaj 64-a Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj pri kontaktoj de ĉinaj esperantistoj kun eksterlandaj en la lastaj jaroj.

Je la 9-a horo antaŭtagmeze, la kunveno inaŭguriĝis en la kanto "La Espero". Kamarado Zhang Qicheng (Ĉ. Ĉen), membro de la Konstanta Konsilantaro de ĈEL, faris raporton pri la laboro de ĈEL kaj raporton pri la 64-a Universalaj Kongreso de Esperanto.

En la sekvanta tago la reprezentantoj faris diskutadon pri la labora raporto de ĈEL. Ili opiniis unuanime, ke iuj sukcesoj estis atingitaj de Ĉinio en esperanta laboro dum la pasintaj 30 jaroj post la fondiĝo de la popola respubliko. Ekzemple, la gazeto El Popola Ĉinio, kreita tuj post la Liberiĝo, havas siajn legantojn en la tuta mondo; pli ol 250 esperantaj libroj estas eldonitaj de post la jaro 1952, inter kiuj troviĝas Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong, Noveloj de Lusin, Ĉina Antologio k.a.; precipe post kiam vicĉefministro Chen Yi faris instrukcion en la Ĉina Esperanta Labor-kunveno en 1963, pliprosperiĝis la esperanta movado en la lando. Tiam nombro

da junaj esperantistoj estis elkulturita en Beijing, esperantaj kursoj estis funkciigitaj en 11 universitatoj; esperanta disaŭdiĝo ekfunkciis en Radio Pekino kaj nemalmultaj esperantaj grupoj fondiĝis en diversaj lokoj de Ĉinio. Tamen poste, pro detruo de Lin Biao kaj la "kvarpersona bando", la movado de esperantaj grupoj en diversaj lokoj ĉesiĝis; parto de la esperantistoj estis malfeliĉe persekutata kaj la eldonado de espe-



K-doj Hujucz (maldekstre) kaj Liao Jingdan en la kunveno

Zhang Qicheng, membro de la Konstanta Konsilantaro de ĈEL, faras raporton pri la laboro de ĈEL.



rantaj libroj kaj revuoj estis ĝenita de la ekstrema "maldekstra" linio.

De post la faligo de la bando, sub zorgo de la Partio kaj registaro, ĉinaj esperantistoj revigligis iom post iom sian movadon kaj starigis esperantajn organizojn en iuj provincoj kaj municipoj, plibonigis eldonon de esperantaj libroj kaj disaŭdigon de esperantaj programoj kaj sendis esperantajn delegaciojn por partopreni en la Universala Kongreso de Esperanto. Krome ili akceptis fremdlandajn esperantistajn delegaciojn kaj esperantistojn, kiuj venis al Ĉinio por vizitado.

La reprezentantoj prezentis multajn proponojn por pluapaŝe bonigi la esperantan laboron. Ili opiniis, ke oni devas daŭre plenumi la instrukciojn de prezidanto Mao kaj vicĉefministro Chen Yi pri Esperanto, unuigi la esperantistojn de la tuta lando por disvastigi Esperanton, kaj vaste fari internacian interŝanĝon de scienco, tekniko kaj kulturo por akceli interkompreniĝon kaj amikecon inter nia popolo kaj popoloj de aliaj landoj kaj servi por modernigi nian landon kaj defendi la mondan pacon. Ili ankaŭ esprimis, ke ili nepre devas krei kondiĉon por efektiviĝi la deziron de vicĉefministro Chen Yi okazigi en Bejing Universalan Kongreson de Esperanto.

Multaj reprezentantoj opiniis, ke konforme al la nova situacio la Konsilantaro de ĈEL devas esti pligrandigita kaj akcepti junajn talentajn esperantistojn.



Antaŭtagmeze de la 31-a de aŭgusto la kunveno fermiĝis. La kunvenon ĉeestis Hujucz, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, vicprezidanto de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj prezidanto de la Konstanta Konsilantaro de ĈEL; Liao Jingdan, vicedestro de la Propaganda Departemento de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio; Li Qi, vicministro de la Eduka Ministerio kaj Luo Jun, estro de la Administracia Buroo de la Fremdlingva Eldonado kaj Distribuado. Ili diris gratulajn vortojn al la kunveno, laŭdis la ĉinajn esperantistojn pro iliaj sukcesoj en esperanta laboro kaj kuraĝigis ilin liberigi penson, bazi ĉion sur la faktoj, plibonigi la revuon El Popola Ĉinio, eldonadon de esperantaj libroj kaj esperantan disaŭdigon, bone fari propagandon kaj disvastigon de Esperanto en la lando kaj kulturi pli multe da junaj esperantistoj. La kunveno fermiĝis en la kanto "La Internacio" en Esperanto.



Diskuto en grupeto

Ĉie Abundas Amikeco

— Impresoj pri la 64-a UK



K-do Zhang Qicheng donas salutvortojn en la nomo de ĈEL.

D-ro Tonkin, prezidanto de la kongreso, prezidas la inaŭguron.

ALVENO AL LUCERNO

Adiaŭinte Beijing (Pekinon), mi, kune kun kelkaj ĉinaj esperantistoj, flugis al la bela Svislando por ĉeesti la 64-an Universalan Kongreson de Esperanto. En unu tago ni trapasis tri flughavenojn: Teheranon, Beogradon kaj Zurikon. Ju pli malproksimen la vojaĝo, des pli da streĉiteco kaj timo en mi.

Unuafoje mi forlasis la hejmlandon. Alveninte al la tute fremdaj lokoj, mi kvazaŭ fariĝis surda kaj muta. Ĉar en tiuj lokoj oni parolas la lingvojn persan, serban, germanan kaj francan, sed mi konas neniun alian lingvon krom mia gepatra lingvo kaj Esperanto. Mi ĉiam sekvis miajn ĉinajn kunvojaĝantojn timante, ke mi sola perdiĝus kaj restus inter fremduloj sen komuna

lingvo. Nur kiam ni atingis Lucernon kaj trovis la giĉeton "Esperanto" ĉe la stacidomo, mi ekĝojis kaj kvazaŭ denove ekhavis miajn langon kaj orelojn. La deĵoranto fervore informis nin, kiamaniere ni povas atingi nian hotelon kaj kie estas la kongresejo.

Alproksimiĝante al la kongresejo, ni jam plurfoje renkontis gesamideanojn, kiuj nin salutis rimarkinte la verdajn stelojn sur niaj brustoj. En la kongresejo ni estis varme akceptataj de gesamideanoj deĵorantaj ĉe diversaj giĉetoj. Ni tre ĝojis, ke ni estis bonvenigataj de estraranoj de UEA. Ankaŭ kun multaj geamikoj ni gaje renkontiĝis kaj interbabilis. Tiam mi tute forĵetis mian timemon. Varma fluo karesis mian koron. Troviĝante en la varma kaj amikeca internacia familio, mi sentis min tre gaja kaj feliĉa.



Ĉinaj kaj alilandaj geesperantistoj

ESPERANTO PLEJ TAŬGAS POR ESTI INTERNACIA LINGVO

Ĉirkaŭ 1,600 geesperantistoj el 49 landoj ĉeestis la kongreson. D-ro Tonkin prezidis la solenan inaŭguron. Reprezentanto de la Prezidanto de la Svisa Federacio kaj diplomatoj de diversaj landoj salutis la kongreson, inter kiuj estis ankaŭ reprezentanto de la ĉina ambasado. Salutis ankaŭ reprezentantoj de landaj asocioj, interalie k-do Zhang Qicheng parolis en la nomo de la Ĉina Esperanto-Ligo (Lian paroladon vidu en la 9-a numero de "El Popola Ĉinio"). D-ro Tonkin faris gravan prelegon.

Mi estis tre ĝoja, ke en la internacia infana jaro mi vidis tiom multe da infanaj esperantistoj ĉeestantaj la kongreson. Ili estis invititaj suriri sur la podion. Sur la podio ili ĉiuj eldiris Espe-

rante siajn nomojn kaj landojn, kaj en la koridoro mi aŭdis Esperantan interparoladon de kelkaj el ili. Mi ĉeestis la du ĝeneralajn kunsidojn, en kiuj oni diskutis pri la laborraporto de UEA kaj pri la rezolucio pri la kongresa temo. Mi aŭskultis prelegojn de la Internacia Somera Universitato kaj prelegojn pri la kongresa temo. Mi ankaŭ spektis rakonton, recitalon kaj teatraĵon. Ĉiuokaze mi aŭdis, ke oni parolas Esperanton tiel lerte kaj flue, plene esprimante siajn ĝojon, malĝojon, koleron aŭ eĉ amon, kvazaŭ oni parolus la gepatran lingvon en sia familio. Ĉio tio konvinke pruvis, ke Esperanto estas vere vivanta lingvo.

La okcidentaj lingvoj por ni orientanoj estas sufiĉe malfacilaj. Ankaŭ Esperanto estas ne tiel facila por ni. Ŝajnis al mi, ke la eŭropanoj parolas tro rapide, ĉar ni ankoraŭ ne kutimiĝis al tia rapideco. Eble ankaŭ la eŭropanoj ne kutimas aŭskulti nian parolon. Tamen tio ne formis gravan baron. Iu hungara amiko diris al mi: "Antaŭe mi opiniis, ke parolo de ĉinaj esperantistoj eble estas malfacile komprenebla por ni. Sed aŭdinte vian prelegon, mi jam tute komprenas vin." Tio montras, ke per Esperanto oni povas bone kompreni unu alian, kaj ĝi estas multe pli facila ol iu ajn nacia lingvo kaj plej taŭgas por esti internacia lingvo.

ĈIE TRA LA MONDO TROVIĜAS NIAJ AMIKOJ

En Svislando, la fama "monda parko", ĉie estas ĉarmaj pejzaĝoj. Tial la ekskursoj aranĝitaj de la kongreso estis tre allogaj kaj interesaj. Ni vizitis la monton Pilatus. Per nacelo kaj pendgondolo ni atingis la supran stacion kaj mi grimpis ĝis la plej alta montpinto. Ĝi estas tiel alta, ke ni jam tute dronis en nubmaro. Ni malsupren veturis per la plej kruta dentrela fervojo ĝis lagbordo. Poste ni revenis al Lucerno per motorŝipo kaj sur la ŝipo mi sate ĝuis la pitoreskan pejzaĝon ĉirkaŭ la lago. Lucerno estas belega. La altaj montoj kun neĝkovritaj pintoj, la verda lago ornamita per blankaj veloj, la domoj en diversaj formoj kaj koloroj, la arboj tiel altaj kaj

rektaĵoj, kaj la floroj freŝaj kaj prosperaj, ĉio ĉi formis belegan bildon, ke oni ne volis ĝin forlasi.

Tamen vere neforgesebla estas la maro de amikeco inter geesperantistoj, en kiu ni dronis. Dum la ekskursoj, anstataŭ ĝui la belegan pejzaĝon, mi ofte prefere interbabilis kun alilandaj geamikoj. Ĉu en pendvagono, trajno, ŝipo aŭ buso ĉie estis gaja kaj amikeca interbabilado. Ankaŭ ĉe la kongresejo mi ofte renkontis diverslandajn geamikojn. Kun iuj el ili mi jam delonge korespondadis, kaj la aliajn mi tute ne konis antaŭe. Sed ni ĉiuj fariĝis intimaj amikoj tuj post la renkontiĝo. Iun posttagmezon ni iris sur strato de Lucerno, hazarde ni renkontis iun gastaman svisan esperantiston. Li volonte akompanis nin viziti faman preĝejon kaj promenadi sur stratoj, kaj eĉ gastigis nin en kafejo. Sur strato de Lugano ni renkontiĝis kun kelkaj geesperantistoj el orienteŭropaj landoj kaj ni kune fotis nin kun memortuko de la kongreso. En la dua ĝenerala kunsido mi havis la honoron fari paroladon invitite. Antaŭ ol mi suriris sur la podion, iu japana samideanino kuraĝigis min kaj deziris al mi sukceson. Kaj post mia descendo de la podio pluraj geamikoj, el kiuj iujn mi jam konis kaj


aliajn ne, premis mian manon kaj min gratulis. Informiĝinte ke mi venis el Ĉinio, iu aŭstralia sinjoro varme min salutis kaj konigis al mi sian edzinon, kiu tre ŝatas la ĉinan Esperantan revuon "El Popola Ĉinio". Ŝi mem abonis dek ekzemplerojn de la gazeto kaj ilin dissendas al siaj geamikoj. Ankaŭ multaj aliaj gesamideanoj laŭdis la revuon, esprimis sian kontentecon pri ĝia pliboniĝo kaj deziris al ĝi pli grandan sukceson. Kompreneble ĉio tio montris profundan amikecon ne nur al mi mem, sed ankaŭ al la ĉina popolo.

Tamen, en la kongresaj tagoj okazis malagrablaĵo. La Kongresa Kuriero atentigis, ke kelkaj kongresanoj, ne obeante la regulon de la kongreso, distribuis dokumentojn en la kongresaj ejoj sen la eksplicita permeso de la kongresaj organizantoj. Tia agado kompromitis la neŭtralecon de la Asocio, kaj do estas bedaŭrinda kaj devas esti strikte malpermesita de nun.

Mi deziras pli grandan sukceson al la 65-a Universala Kongreso en Stokholmo!

** La aŭtoro estas membro de la Ĉina Esperanto-Delegacio al la 64-a UK.*

Ĉinaj esperantistoj vizitas faman preĝejon en Lucerno, akompanate de svisa esperantisto d-ro Tazio Carlevaro.



Lingva Diskriminacio — Netolerebla Maljustaĵo

— Esperanto Estas la Plej Racia Solvo de la Internacia Lingva Problemo

(Parolo en la dua ĝenerala kunsido de la 64-a Universala Kongreso de Esperanto)

MI venis el Beijing (Pekino), el la Ĉina Popola Respubliko. Nuntempe, tio, kio estas plej grava por la ĉina popolo, estas la modernigo de nia lando, ĉu ekonomie, ĉu kulture. Por plenumi tiun urĝan taskon, ni ĉinoj devas multe lerni de la progresintaj landoj. Ni devas partopreni en la monda vivo, aliĝi al internaciaj organizaĵoj, ĉeesti internaciajn konferencojn, komerci kun diversaj landoj kaj ekspedi gejunulojn al aliaj landoj por studi. Sed ni tuj renkontas la problemon de lingvaj rimedoj. Kvankam la ĉina lingvo estas oficiale uzata en la Unuiĝintaj Nacioj, tamen ni bone scias, ke, ekster nia lando, sen interpretisto ni povas fari preskaŭ nenion per la ĉina lingvo. Ni estas devigataj lerni diversajn fremdajn lingvojn. Pro manko de tiaj homoj, kiuj scipovas bone fremdajn lingvojn, nun en ĉiuj mezlernejoj, universitatoj kaj fakaj lernejoj, kaj ankaŭ en televido kaj disaŭdigo oni instruas la anglan, japanan, francan kaj aliajn lingvojn. Milionoj kaj milionoj da homoj lernas fremdajn lingvojn, sed nur tre malmultaj el ili povas ellerni kaj bone posedi, tio kaŭzas multegan malŝparon de tempo kaj mono.


Kompreneble, tia malŝparo okazas ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en aliaj landoj kaj en diversaj internaciaj organizaĵoj. Ekzemple en la Unuiĝintaj Nacioj oni multe elspezas por traduki dokumentojn en diversajn lingvojn. Kial oni ne uzas nur unu lingvon en la internacia sfero? Ĉar neniun nacia lingvo nun povas ludi la rolon de unu sola monda lingvo. Verŝajne la angla lingvo estas pli vaste uzata. Tio estas postlasita de la koloniisma historio. Sed ĉiuj nacioj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj, devas havi egalajn rajtojn. Ĉiu ajn diskriminacio ne plu estas tolerebla. Kvan-

kam la ĉinan lingvon parolas pli ol 900 milionoj da homoj, t.e. kvarono aŭ kvinono de la homaro, tamen ni ĉinoj neniam kaj neniom intencas trudi la ĉinan lingvon al la mondo. Ĉar ni oponas kontraŭ hegemoniismo kaj diskriminacio, ĉu en politiko, ĉu en lingva problemo. La internacia lingvo nepre devas esti neŭtrala. Nur la neŭtraleco alportas universalecon. Kion ajn farante en la internacia familio, oni devas konsideri la oportunon kaj interesojn ne nur de unuopaj nacioj, sed ankaŭ de la tuta homaro.

La eŭropaj lingvoj estas sufiĉe malfacilaj por ni ĉinoj, eble ankaŭ por aliaj orientanoj, t.e. por kvarono, duono aŭ eĉ plimulto de la homaro; kaj samtempe, la ĉina lingvo estas des pli malfacila por okcidentanoj. Tial la internacia lingvo nepre devas esti la plej facila por ĉiuj popoloj. Ankaŭ Esperanto ne estas tiel facila por ni, sed ĝi estas multe pli facila ol ĉiu ajn nacia lingvo. Do, Esperanto povas esti rigardata la plej racia kaj kontentiga solvo de la internacia lingva problemo.

Kompreneble tion ankoraŭ ne komprenas multaj neesperantistoj, antaŭ ni estas multaj malfaciloj kaj ni devas multe klopodi. Ni devas pli multe agi, praktiki kaj plivastigi la uzadon de Esperanto. Ju pli la praktika utileco de Esperanto montriĝas al la amasoj, des pli multe da homoj agnoskos la valoron de Esperanto. En Ĉinio oni ofte diras: la vojo estas zigzaga, kaj la perspektivo estas lumplena. Mi kredas, ke nia laboro sur la Esperanto-kampo ankaŭ tiel progresos. Dankon!

La 3-an de aŭgusto, 1979.



MINGXING :

Notoj pri vizito al Lhasa

Ĉisomere mi vizitis Tibeton.

Kiam nia aviadilo proksimiĝis al la flughaveno Kungga en Lhasa, prezentiĝis sube vasta valo, verda kamparo kaj altaj montoj vualitaj de nebuloj. Min impresis Lhasa per sia natura beleco.

Lhasa situas en la absoluta alteco de 3,700 metroj kaj oni facile suferas altmontan reakcion tuj veninte ĉi tien. Tamen oni povas rapide alkutimiĝi al la klimato, se oni iras nerapide kaj havigas al si sufiĉan ripozon.

SUR LA STRATOJ

Antaŭ mia hotelo estas strato direktiĝanta de-oriente-okcidenten. Ambaŭflanke de la strato troviĝas nemalmultaj butikoj, institucioj, lernejoj k.a. Sur ombraj trotuaroj estas multaj pasantoj en tibetanaĵoj. Sur la strato senĉese trapasas aŭtoj. Mi iris en iun vastan kaj helan butikon kun pli ol 20 servotabloj de ŝtofoj, vestoj, specialaj bezonaĵoj de tibetanoj k.a. Sur la varbretaroj troviĝas produktaĵoj de Tibeto kaj de aliaj lokoj. Kontraŭ la butiko estas librejo, kies bretaroj estas plenaj de libroj en la tibeta kaj hana lingvoj. Multaj estas aĉetantaj la dokumentaron de la Dua Sesio de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso.

Mi forlasis la librejon kaj venis al konstruejo de ŝoseo. Tie mi vidis vicdirektorinon Zhaxi Degyi de la Lhasa-a Konstrua Kompanio. Ŝi diris al mi, ke en la pasinteco Tibeto estis tre mizera loko pro la regado de la loka registaro, templo kaj aristokrataro. En 1951, delegitoj de la Centra Popola Registaro kontraktis traktaton kun la loka registaro de Tibeto pri la paca liberigo de Tibeto. Sed poste, en marto de 1959, la supera reakcia reganta kliko de Tibeto, subtenate de alilandaj reakciuloj, faris arman ribelon. La miliono da indignigitaj servutuloj kaj la garnizonaj trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en la regiono subpremis la ribelon. Tuj sekve, oni faris demokratian reformadon, abolis la feŭdan servutan sistemon. Rezulte de tio Tibeto havis radikalan ŝanĝiĝon. Montrante Potala-palacon Zhaxi Degyi diris: "Vidu, antaŭe inter Potala-palaco kaj Zuglakang-templo estis haladzaj marĉetoj. Sed nun tie estas viglaj stratoj." Li diris krome: "Se vi ascendus Potala-palacon, vi havus panoraman vidon de la nova Lhasa."

Veninte antaŭ la palacon mi komencis grimpi sur la zigzaga ŝtuparo. Mi malfacile atingis la tegmenton de la palaco alta je 110 metroj kaj rigardis ĉirkaŭen. Sube prezentiĝis bela vidaĵo: Oriente estas domo de civila aviado, popola hos-

pitalo kaj institucioj, okcidente estas la Unua Mezlernejo de Lhasa, sude estas la sidejo de la registaro de la Tibeta Aŭtonoma Regiono kaj norde estas fabrikoj. En la lastaj 20 jaroj la totala areo de konstruaĵoj multiĝis 10-oble.

En la brilo de la subiranta suno mi descendis la palacon kaj renkonte al mi venis grupo da tibetanoj kun akvobotelo sur la dorso. Ili iras kantante kaj dancante, mano en mano. Mia gvidisto diris: "Ili revenis de la parko Norbu Lingka, evidente ili havis ĝojan distraĵon tie." Rimarkinte mian nekomprenon li aldonis: "Norbu Lingka antaŭe estis somera palaco de Dalajlamao, la politika kaj religia gvidanto de Tibeto. Tie la pejzaĝo estas tre ĉarma. Sed antaŭe ordinaraj tibetanoj ne povis eniri. Nun ĝi fariĝis popola parko kaj la loĝantoj de Lhasa ŝatas pasigi feriojn tie ĝuante sekalan vinon kaj buteran teon."

EN LA UNUA ELEMENTA LERNEJO

Mi venis al la Unua Elementa Lernejo de Lhasa. La gastama lernejestrino kondukis min en kabineton en la dua etaĝo. Ŝi prezentis al mi teon kaj komencis paroli entuziasme pri tiu lernejo fondita post la Liberiĝo.

Antaŭ la Paca Liberiĝo en 1951, en Tibeto estis nur du elementaj lernejoj kaj la lernantoj senescepte estis infanoj de sklavmastroj kaj aristokratoj. Post la Paca Liberiĝo, oni fondis,


post interkonsiliĝo kun la tibeta registaro, en aŭgusto de 1952, la Unuan Elementan Lernejon de Lhasa. Por ke infanoj de servutuloj povu lerni en la lernejo, la lernejo donis al la lernantoj senkostajn manĝaĵojn kaj instruadon.

Post subpremo de la ribelo en 1959, la miliono da servutuloj estis liberigitaj kaj multe progresis la eduka afero. En Lhasa fondiĝis pluraj elementaj kaj mezaj lernejoj por infanoj de servutuloj. La nombro de lernantoj de la Unua Elementa Lernejo kreskis de 300 ĝis 1,000 kaj la lernejo fariĝis la plej granda inter la elementaj lernejoj de Tibeto.

Je la fondiĝo de la Prepara Komitato por Starigo de Tibeta Aŭtonoma Regiono, vicĉefministro Chen Yi venis al tiu lernejo en la nomo de la Centra Komitato de la Partio. Vicĉefministro Chen Yi kuraĝigis la lernantojn lerni diligente por konstrui Tibeton estonte. Nun la silka flago donacita de la Centra Delegacio ankoraŭ pendas sur la muro en la kabineto de la lernejo. Depost la fondiĝo de la lernejo la registaro plurfoje donis monhelpon al la lernejo por ĝia plivastigo kaj ekipado. La nombro de klasĉambroj multiĝis de 7 ĝis 31.

La lernejestrino diris al mi, ke komence ĉiuj lernantoj estis tibetanoj kaj oni instruis ilin nur en la tibeta lingvo. Poste la lernejo akceptis ankaŭ hanajn infanojn kaj oni instruis ankaŭ en la hana lingvo. La lernantoj estis dividitaj

La Popola Strato de Lhasa



en klasojn de la tibeta lingvo kaj la hana lingvo. Sed plimulto de la lernantoj povas paroli en ambaŭ lingvoj.

Post la Demokratia Reformado Tibeto ĝeneraligis elementan edukadon kaj disvolvis la edukadon de mezlernejo kaj altlernejo. La diplomitoj de la lernejoj ludas aktivan rolon en la konstruado de Tibeto.

DISVOLVIĜO DE LA TIBETMEDICINA HOSPITALO

Sur la nova Popola Strato troviĝas la Tibetmedicina Hospitalo. Pacientoj de multaj lokoj en la lando sendis al ĝi leterojn por konsulti ĝin aŭ aĉeti ĝiajn kuracilojn. Kiam mi venis al la hospitalo, min akceptis vicestrino de la hospitalo Mima Yexe en la aĝo de pli ol 40 jaroj. Ŝi entuziasme konigis al mi la disvolviĝon de la hospitalo.

Antaŭe la hospitalo nomiĝis “Mainzikang” (medicina kaj aritmetika institucio). Ĝi instruis tibetajn medicinon kaj kalendaron kaj ankaŭ akceptis pacientojn. Antaŭ la Demokratia Reformado ĝi estis la sola hospitalo en Tibeto, kaj fakte havis nur 4 kuracistojn kaj 6 farmaciistojn. Tiam nur aristokratoj kaj riĉuloj estis kuracataj en la hospitalo kaj por ordinaraĵ tibetanoj estis tre malfacile ricevi helpon de ĝi.

La tibeta medicino havas longan historion. La tibetmedicina kuracisto Yutog Nyingma resumis la spertojn de la tibetaj popolaj medicino kaj farmacio, lernis la medicinon kaj farmacion

de frataj naciecoj, kaj surbaze de tio kompilis la faman “Kvarvoluman Farmakopeon”. La verko metis fundamenton por disvolvo de la tibeta medicino. Sed la reakcia kaj feŭda servuta sistemo malhelpis ĝian disvolviĝon kaj ĝis la Demokratia Reformado la tibeta loka registaro fondis nur tiun malgrandan “Mainzikang”.


Montrante la korton ŝi diris, ke la popola registaro donis investaĵon por plivastigo de la hospitalo. Nun la hospitalo inkluzivas klinikon, esploran institucion kaj farmacian fabrikon. La nombro de laborantoj de la hospitalo superis 180.

Kiam mi venis en la Esploran Instituton de la Tibeta Medicino en la kvara etaĝo, mi vidis la farmakopeon kaj multajn aliajn verkojn pri la tibeta kaj hana medicinoj. Kelkaj maljunaj tibetmedicinaj kuracistoj estis diskutantaj problemojn. La vicedirektorino diris al mi, ke ili esploras la tibetajn medicinon kaj farmacion kaj samtempe akceptas pacientojn. En la lastaj jaroj ili faris esploron al artrito, stomaka ulcero, hipertensio k.a. malsanoj, ordigis kaj kompilis 7 librojn, inkluzive de “Tibetmedicina Terapio de Stomaka Ulcero”, “Praktika Fundamento de la Tibeta Medicino” kaj “Tibeta Farmacio”, el kiuj iuj estis eldonitaj kaj trovis bonvenigon de la tibeta popolo.

Nun la tibeta medicino estas disvastigata kaj disvolvita en lerno de la ĉina medicino kaj eŭropa medicino. Nun preskaŭ ĉiuj hospitaloj de Tibeto havas klinikon de tibeta medicino. Plimulto de la kamparaj sanitaristoj scipovas la



En magazeno



Instruistino de la Unua Elementa Lernejo helpas siajn lernantojn.

tibetajn medicinon kaj farmacion. Kuraco al tibetanoj estas senpaga.

ZUGLAKANG-TEMPLO

Sur Bajiao-strato sidas la fama Zuglakang-templo. Akompanate de administranto Baima, mi vizitis tiun templon.

La templo estis konstruita en la 7-a jarcento. La impona kaj fortika konstruaĵo estas farita el argilo kaj ŝtono, kun ebena tegmento. Kaj cetere la templo havas oritajn firstojn, kapitelojn, konkavajn plafonojn kaj aliajn akcesoraĵojn de han-nacieca karaktero. La konstruaĵo karakteriziĝas per forta religia koloro. Legendo diras, ke tie antaŭe estis lageto. Foje ora ringo de princino Wencheng falis en la akvon kaj je tio leviĝis el la akvo pagodo ore brilanta. La tibeta reĝo rigardis la lokon sanktejo kaj ordonis plenigi la lagon kaj konstrui templon. Nun en halo de la templo konserviĝas fresko pri tiu legendo.

La totala areo de la konstruaĵo de la templo superis 25,000 kvadratajn metrojn. La templo havas tri etaĝojn. En la unua kaj dua etaĝoj ĉirkaŭ la centra halo estas multaj ĉambroj, en kiuj estis multaj statuoj, inkluzive de tiuj de la tibeta reĝo Sunzamkampo kaj princinoj Wencheng kaj Chizun, kaj ankaŭ ora statuo de Ŝakjamunio alportita de princino Wencheng de la ĉefurbo de Tang-dinastio Chang-an (la nuna Xi-an), budhoj kun mil brakoj kaj mil okuloj. La traboj, fostoĵoj kaj por-dokadroj de la halo estis dekoraciitaj per reliefoj kaj koloraj pentraĵoj de flugantaj feinoj, homoj, bestoj, birdoj kaj vegetaloj. La muroj en kaj ekster la haloj estas kovrataj de koloraj freskoj pri diversaj legendoj. Iuj freskoj priskribas kiel princino Wencheng venis en Tibeton, aliaj pri la vivo de Ŝakjamunio, kaj triaj priskribas la celebradon de la finkonstruiĝo de la templo. La vivecaj personoj en la freskoj en diversaj pozoj konvinke montris la artan talenton de la antikva popolo de Tibeto. En

la tria etaĝo mi vidis orkolorajn tegmentojn, sur kiuj staras alta ora flago, ora sutrorado akompanata ambaŭflanke de oraj cervoj. Tio estas la fama “ora supraĵo” de templa konstruaĵo de Tibeto.

Kiam ni venis al iu fulgumita fresko en la dua etaĝo, Baima haltis kaj diris al mi: “Vidu, jen la neriparita fresko de la templo.” En la pasinteco la supera reakcia reganta kliko de Tibeto trompatis la popolon per religio por el-premi de la popolo monon kaj malofte donis atenton al riparo de la temploj. En longa tempo, la fulgo de olelampoj nigrigis la halojn. En la kultura revolucio, pro la ĝenado de Lin Biao kaj la “kvarpersona bando”, oni ne faris seriozan riparon al la temploj. En la lastaj du jaroj, la popola registaro donis grandan atenton al la riparado de la temploj. Oni refreŝigis la freskojn, budhajn statuojn k.a. Baima diris al mi: “Oni intence lasis unu el la freskoj neriparita, por ke oni povu klare vidi, kiu vere prizorgas la historiajn objektojn.”


Ekde januaro ĉijare la templo estis malfermita al la publiko kaj budhistoj povas pilgrimi ĝin.

Antaŭtagmeze de lundo, mi rigardis liturgion en Zuglakang-templo. Enirinte en la templon, mi vidis grupon da tibetanoj malrapide paŝantaj al la centra halo kun olea botelo aŭ olea lampo en sia mano. La budhaj ĉambroj ĉirkaŭ la halo estis hele lumigitaj de oleaj lampoj. La kultantoj, preĝante, verŝis la alportitan buteroleon en la lampojn antaŭ la budhaj statuoj, kaj multaj aliaj pie riverencadis klinante sian korpon surgenue al la statuo de Ŝakjamunio.

En la templo mi renkontis kelkajn lamaojn en froko. En la pasinteco lamaoj vivis de almozo. Nun al ili la ŝtato ĉiumonate donas grenon kaj monon por ilia vivo.


VIZITO AL S-RO TUBDAIN CERING

Vidante lamaojn, mi ekpensis pri la vivaj budhoj. Kiel ili vivas nun? Kion ili faras? Por informiĝi pri tio, mi vizitis sinjoron Tubdain Cering, iaman vivan budhon de Zhaibung-templo.



La nove konstruita Tibetmedicina Hospitalo

Zuglakang-templo



Zhaibung estas la plej granda kaj plej fama lamaejo en Tibeto, kaj la malgrandaj lamaejoj de ĝi dependintaj troviĝas tra la tuta Tibeto, en kiuj vivis pli ol 10,000 lamaoj. Antaŭ la Demokratia Reformado, Tubdain Cering estis unu el la 7 vivaj budhoj regantaj la templon.

Tubdain Cering loĝas en etaĝdomo de tibeta stilo kaj ĝis nun restas fraŭlo. Lia ĉiutaga vivo estas prizorgata de unu el liaj disĉiploj. Li akceptis min en sia dormoĉambro pura kaj eleganta. La ĉambro estis nove lakita kaj sur la muroj pendas kelke da pentraĵoj de floroj kaj pejzaĝoj. Apud la lito estas kredenco ruĝe lakita kaj ore desegnita. Sur ĝi staras malgranda libroetaĝero. Mi sidiĝis sur kuseno ĉe la fenestro. Li prezentis al mi laktan teon kaj komencis rakonti al mi pri sia vivo kaj laboro.

S-ro Tubdain Cering estas 67-jara. Antaŭe li havis grandan bienon. En la aĝo de 14 jaroj li lamaĝis kaj poste fariĝis unu el la gvidantoj de la templo. En 1959 li partoprenis en la ribelo kaj estis kaptita. Ĉar li honeste konfesis sian krimon, li estis liberigita de la popola registaro.

Ankaŭ aliaj grandaj kaj malgrandaj vivaj budhoj de Zhaibung-templo, kiuj partoprenis en la ribelo, sed ne fuĝis kaj faris senkaŝan konfeson kaj penton, estis liberigitaj. Kiuj volis resti, tiuj restis en la templo kiel lamaoj, kaj kiuj volis senfrokiĝi, tiuj jam revenis hejmen.

Poste li estis invitita kiel speciala komitato de la Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco de Lhasa. En 1977 li estis elektita membro de la konstanta komitato de la konferenco. Li diris al mi: "Mia patrino jam forpasis, kaj la salajro ĉiumonate donita de la ŝtato estas sufiĉa por mia vivteno."

FELIĈAJ MALJUNULOJ

Laŭ la ŝoseo apud Lhasa-rivero mi venis al iu vilaĝo situanta inter monto kaj akvo. Tie mi vizitis la Lhasa-an Azilon.

En la malnova socio, sur la stratoj de Lhasa ofte vagadis miloj da almozoŭloj, el kiuj multaj mortis de frosto kaj malsato. Post la Demo-

kratia Reformado, la popola registaro helpis multajn el ili trovi siajn parencojn. Multaj laborokapablaj havis profesion. La invalidoj kaj orfoj estis akceptitaj en la azilon. En la pasintaj 20 jaroj plimulto de la maljunuloj forpasis kaj la orfoj fariĝis plenaĝuloj kaj havis profesion. Nun en la azilo vivas 36 maljunuloj en komforta vivo.

Paŝinte en la pordon, mi vidis boskon. Ĉe la fino de aleo estas vasta korto ĉirkaŭata de unuetaĝaj domoj. En la fino de la korto staras pluretaĝa domo, antaŭ kiu kreskas vico da arbiĉoj. Sub la arboj kreskas diversaj floroj. Direktoro de la azilo gvidis min en la pririgardo. Ĉiuj ĉambroj estis tre puraj kaj bonordaj. La ĉambroj estis meblitaj per unu aŭ du litoj. Sur ĉiu lito estas dika matraco kaj pura litkovrilo. Multaj ĉambroj estas ornamitaj per freŝaj floroj. La maljunuloj estis babilantaj aŭ ripozantaj.

En iu ĉambro mi havis interparoladon kun blinda maljunulo Gungug en la aĝo de pli ol 60 jaroj. Antaŭe li estis sklavo. Foje li malfruiĝis al laboro kaj la okuloj estis blindigitaj de la mastro per batado. Poste li estis elpelita kaj vivtenis sin per almozo. Fine li venis al Lhasa. Li povas kanti popolajn melodiojn kaj ofte kantis sur stratoj por akiri almozon. Li diris, ke sen la Demokratia Reformado li ja ne povus vivi ĝis hodiaŭ. Poste li ĝoje kantis por mi kanton pri la nuna feliĉa vivo. La direktoro diris al mi, ke Gungug estas tre laborema kaj ofte helpis la manĝejon en ĝia laboro.

La direktoro aldonis, ke kiam fondiĝis la azilo, ni havis nur tiun etaĝdomon, poste la registaro donis specialan monon por konstrui domojn kun sume 54 ĉambroj. Nun la azilo havas legomkampojn, forcejon, fruktoĝardenon kaj malgrandan paŝtejon. Krom manĝaĵoj liverataj de la ŝtato, la maljunuloj povas ĝui ankaŭ produktitajn de ili legomojn, fruktojn, viandojn kaj lakton.

Mi adiaŭis la azilon por reiri al mia hotelo. Rigardante survoje la gajan Lhasa-riveron kaj la ambaŭbordajn kampojn de spikiĝanta tritiko, mi sentis grandan ĝojon pro la feliĉa hodiaŭo de la tibeta popolo.


Tibeta Aŭtonoma Regiono

TIBETO, meznombro je pli ol 4,000 metroj alta super la mara nivelo, situas en la sudokcidenta parto de nia lando kaj estas nomata "la firsto de la mondo". Ĝi havas areon de pli ol 1,200,000 kvadrataj kilometroj kaj 1,750,000 loĝantojn de tibeta, hana, menba-a, luoba-a kaj huj-a naciecoj, el kiuj la tibetanoj konsistigas 96%. Tibeto konsistas el 5 subregionoj, 1 municipalo kaj 71 gubernioj. Ĝia ĉefurbo estas Lhasa. Ĝi estis pace liberigita en 1951, abolicis feŭdan servutan sistemon kaj faris demokratian reformon en 1959, kaj la popola registaro de la Tibeta Aŭtonoma Regiono fondiĝis en la 9-a de septembro, 1965.

Antaŭ la Liberigo la feŭda servuta sistemo longe regadis super Tibeto, kaj fakte ĝi estis homa infero. Tiam la tri grandaj posedantoj (la reakcia loka registaro, lama-temploj kaj nobeloj), kiuj konsistigis malpli ol 5 centonojn de la tibeta loĝantaro, posedis la teron, montojn, riverojn, lagojn, arbojn kaj plejparton de la brutaro. La servutuloj kaj sklavo, rigardataj kiel "parolpovaj brutoj", havis nenian teron, eĉ nenian individuan liberon kaj estis ekspluatataj, subpremataj, mortigataj, vendataj kaj donacataj laŭplaĉe de la tri grandaj posedantoj. Sub regado de tiu feŭda servuta sistemo, Tibeto havis neniun modernan industrion, la agrikulturo troviĝis en primitiva stato, la transportado estis plenumita de brutoj kaj homoj kaj la kulturo en ekstrema postiginteco.

En la pasintaj 20 jaroj post la demokratia reformo, Tibeto havis grandan progreson, ĝi iom post iom konstruis pli ol 200 mezajn kaj malgrandajn fabrikojn, minejojn kaj entreprenojn de elektro, karbo, metalurgio, maŝinfarado, ŝpintekstado, kemio, konstruaj materialoj kaj aliaj. La oficistoj kaj laboristoj nombriĝas je pli ol 120,000, el kiuj la tibetanoj superis la duonon. Novaj industriaj urboj kaj urbetoj aperis sur la Tibeta Altebenajo. La industrio liveras al la agrikulturaj kaj paŝtaj regionoj diversajn maŝinojn kaj materialojn, kaj tio iom post iom ŝanĝis ilian postigitan manieron de produkto. Nun la regiono jam povas produkti sufiĉe da greno por kontentigi sian bezonon, ĝia totala produktokvanto de greno kaj la totala nombro de brutoj triobliĝis kompare kun tiuj antaŭ la demokratia reformo. Post kiam la ŝoseoj Sichuan-Tibeta kaj Qinghai-Tibeta malfermiĝis al trafiko en 1954, la regiono jam konstruis pli ol 90 trunkajn kaj branĉajn ŝoseojn kun totala longeco de pli ol 15,000 kilometroj, kiuj kunligas 69 guberniojn. Krome, oni malfermis aerajn liniojn Lhasa-Chengdu-an kaj Lhasa-Lanzhou-an. La konstruata Qinghai-Tibeta Fervojo jam etendiĝis de Xining ĝis Golmud kun longeco de 834.5 km. en la lasta julio.


Ankaŭ la kulturo, eduko kaj publika sano en Tibeto ricevis grandan disvolviĝon. Ĝi nun havas kvar altajn lernejojn, 80 mezgradajn lernejojn kaj pli ol 6,624 elementajn



★ Beijing
○ Lhasa

lernejojn kun pli ol 280,000 lernantoj. La urbo Lhasa kaj ĉiu gubernio havas sian hospitalon, kaj plejparto de ĝiaj popolaj komunumoj sian kuracejon. En Tibeto estas pli ol 4,400 malsanulaj litoj, t.e. 20-oblo de tiuj en 1959. La nombro de kuracaj laborantoj pliiĝis de pli ol 300 en 1951 ĝis 5,700 nun. Krom tio pli ol 10,000 kamparaj kuracistoj servas al la kamparanoj kaj paŝtistoj. Por havigi al Tibeto proprajn naciecajn kuracistojn, la ŝtato stariĝis tie 7 mezgradajn sanitarajn lernejojn, kaj la starigo de la Tibeta Medicina Instituto nun estas en preparado. La tibeta lingvo estas vaste uzata, ĉu en la mezgradaj kaj elementaj lernejoj aŭ en la eldonado de ĵurnaloj, gazetoj kaj libroj.

En la nuna Tibeto, la kadroj kun liberigitaj servutuloj kiel la ĉefa parto estas en rapida kreskado. La tibetana kadroj konsistigas pli ol 50% de la guberniaj kadroj, kaj la komunumaj kadroj ĉiuj estas tibetanoj. Ili estas ĉefaj fortoj por gvidi la milionon da liberigitaj servutuloj en konstruado de la nova socialisma Tibeto.



Tian Han verkas.

LAO BAI:

Tian Han kaj Lia Dramo “Princino Wencheng”

SUR la hele lumigita scenejo prezentiĝas gaja historia sceno antaŭ pli ol 1,300 jaroj: En la granda halo de Potala-palaco de Tibeto alte pendas lanternoj kaj koloraj silkrubandoj kaj sonas tamburoj kaj aliaj muzikiloj; tibetanaĵoj kaj hanaj ŝtatoficistoj kaj sinjorinoj ridmienaĵoj varme gratulas la reĝon de Tubo-dinastio de Tibeto Sunzamkampo kaj princinon Wencheng pro ilia geedziĝo.

La brava Sunzamkampo ameme demandas la princinon: “Eble vi ne atendis, ke hodiaŭ ni okazigas tiel grandan geedziĝan feston?”

La ĝentila kaj bela princino Wencheng kap-skuas kaj respondas: “Ho jes, en mia atendo, ĉar mi kredas, ke vi komprenos fine en iu tago la koron de mi kaj mia patro lia imperiestra majesto, kaj la hanoj kaj tibetanoj fariĝos fratoj por eterne.”

Post tio, Sunzamkampo kaj princino Wencheng malaperas brakon en brako, en gaja kantado kaj dancado de palacaj servistinoj.

Tio estas la lasta sceno de la dramo “Princino Wencheng” verkita de la ĉina eminenta dramisto Tian Han.

Wencheng estis princino de Tang-dinastio (599-649 p. K.). Por eterne amikigi la hanan kaj tibetan naciecojn la imperiestro Taizong de Tang-dinastio edzinigis ŝin al Sunzamkampo en la jaro 641. Princino Wencheng kunportis kun si al Tibeto diversajn metiistojn kaj enkondukis en la lokon medicinon, tekstiladon, brodadon, ĝardenistikon, paperfaradon, vinfaradon kaj aliajn avangardajn teknikojn de hana nacieco. Ŝi ankaŭ konstruigis en Lhasa, la ĉefurbo de Tibeto, la templon Ramoĉe kaj projektis la templon Zuglakang. Ŝi estas karmemorata de la

tibeta popolo ankoraŭ hodiaŭ. Laŭ tiu historia fakto Tian Han verkis la dramon “Princino Wencheng” en la kvindekaj jaroj.

En sia literatura aktivado de pli ol 40 jaroj, li verkis, adaptis kaj tradukis preskaŭ 300 teatraĵojn, inter kiuj la vaste konataj estas “Unu Nokto en Kafejo”, “Morto de Fama Aktorino”, “Tri Belulinoj”, “Guan Hanqing”, “Princino Wencheng”, “La Blanka Serpento” kaj “Xie Yao-huan”.

Tian Han naskiĝis en familio de malriĉa kamparano en Hunan-provinco de Ĉinio en la jaro 1898. En sia infaneco li ofte iris rigardi teatraĵojn en proksimaj montvilaĝoj kaj forte interesiĝis pri la teatra arto. En sia aĝo de 14 jaroj li komencis verki dramojn. Dum studado en normala lernejo li legis multajn ĉinajn klasikajn operajn libretojn. En la jaro 1914, monhelpate de siaj parencoj li veturis al Japanio kaj tiel li studis literaturon de Japanio kaj okcidenta Eŭropo kaj modernajn realismajn dramojn de Eŭropo.

“Unu Nokto en Kafejo” publikigita en 1920 kaj “Nokto de Tigroĉasado” publikigita en 1921 estas gravaj verkoj de Tian Han en lia komenca periodo de verkado. La unua verko priskribas, kiel servistino de kafejo estis forlasita de filo de salkomercisto, kaj montris la veron, ke “manpremo de malriĉulo kun riĉulo ne povas esti ĉiam firma”. La lasta verko priskribas, ke iu vagabondo enamiĝis al filino de iu riĉulo, tamen ilia amo trafis malpermeson de la patro de la filino kaj fine la junulo mortigis sin en malespero. Tiuj du unuaktaj dramoj montris, ke amo kaj geedziĝo en la malnova Ĉinio baziĝis sur la socia pozicio kaj riĉaĵo, pri kio la verkisto faris vipadon. Sed tiuj dramoj spegulis ankaŭ la hezitaĵon kaj pesimismen de la verkisto.

En tiu periodo Tian Han ĉinigis dramojn de Ŝekspiro “Hamleto” kaj “Romeo kaj Julieta”. De tiam li oficiale suriris la vojon de dramverkado.

En 1927, kiam la ĉina popolo trafis gravan malsukceson en sia kontraŭimperiisma kaj kontraŭfeŭdisma revolucia batalo, Tian Han partoprenis en la revolucio. Antaŭ tio li iniciatis kune kun Guo Moruo k.a. kontraŭimperiisman

kaj kontraŭfeŭdisman novan literaturan rondon “Kreado”, kaj poste kune kun Lusin k.a. organizis la Union de Maldekstraj Verkistoj kaj la Union de Maldekstraj Dramistoj (ambaŭ organizoj estis sub la sekreta gvido de la Komunista Partio de Ĉinio). En sia dramo “Unuanimeco” li elmetis la sloganon “Kontraŭbatalu tiranojn, faligu tiranojn”, per teatraĵoj la verkisto alvokis la popolon en malfacilaj sociaj cirkonstancoj batali kontraŭ la reakcia reganta klaso. “Unuanimeco” kaj aliaj dramoj spegulantaj la suferojn kaj kontraŭstaron de la ĉina popolo markis, ke la ĉina dramo eniris en novan etapon de la revolucia drama movado.

Kiam la japanaj imperiistoj invadis la Nordorienton de Ĉinio kaj per mararmeo atakis Shanghai (Ŝanhajo), Tian Han verkis, kun plena revolucia entuziasmo kaj patriotismo, multajn dramojn por alvoki la popolon al batalo kontraŭ la japana imperiismo kaj por la naciŝovo. “Kanto de Diplomitigo”, “Marŝo de la Volontuloj” kaj aliaj kantoj kune verkitaj de li kaj la popolaj muzikistoj Nie Er kaj Xian Xinghai estis vaste cirkulantaj siatempe (“Marŝo de la Volontuloj” poste fariĝis provizora Nacia Himno de la nova Ĉinio). Tiam li gvidis la kontraŭjapanan teatran trupon kaj samtempe skribis multajn dramojn, operojn kaj scenarojn de filmoj por kuraĝigi la tutlandajn armeon kaj popolon batali kontraŭ la japanaj agresantoj ĝis la fina venko.

“Tri Belulinoj” estas la ĉefverko de Tian Han en la meza periodo de lia verkado. La dramo priskribas tri virinojn, inter kiuj unu estas laboristino de ŝpinejo, perfortita de japana agreŝanto kaj poste sin prostituis por akiri vivrimedojn; alia estas klera virino, kies amon rompis la milito; kaj la tria estas revolucia virino pene batalanta por sendependeco kaj libero de la nacio. Fine en jubilo de la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito ili komencis la novan vivon. Ĉar tiuj tri virinoj estas belaj tiel en aspekto kiel en animo, la verkisto donis al sia dramo la titolon “Tri Belulinoj”.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio Tian Han funkciis kiel estro de la Arta Buroo de la Kultura Ministerio kaj gvidis la teatran laboron. Li serioze plenumis la revolucian literaturan kaj



Ĉefministro Zhou Enlai (la dua de maldekstre) gratulas Tian Han pro la sukcesa prezentado de lia dramo.

artan linion de Prezidanto Mao Zedong, klopodis por gajni la teatrajn artistojn, aktive faris reformon al malnovaj operoj kaj atingis grandan sukceson en tio. Samtempe li skribis dramojn "Guan Hanqing" pri antikvan verkiston de operaj libretoj, "Princino

Wencheng" k.a. Li ankaŭ adaptis pekin-operojn "La Blanka Serpento", kiu severe kritikas la feŭdajn fortojn kaj priantas sinceran amon, "Okcidenta Ĉambro", kiu priskribas batalon kontraŭ feŭda etiketo kaj aspiron al libero kaj feliĉo, "Xie Yaohuan", kiu priskribas ŝtatoficistinojn

En la dramo princino Wencheng kaj Sunzamkampo en sia geedziĝa ceremonio




kiu severe punas potenculaĉon por la popolo, kaj aliajn tradiciajn teatraĵojn. Ĝuste pro tiuj verkoj li ĝuas altan renomon.

“Guan Hanqing” estas la ĉefverko de Tian Han en lia lasta periodo de verkado. Li verkis ĝin en 1958 por memorigi la mondan kulturen eminentulon Guan Hanqing (1279-1368). En tiu verko li sukcese modlis figuron de la ĉina granda dramverkisto, kaj la verko estis nomata de la ĉinaj literaturaj kaj artaj rondoj “brila gemo” inter la ĉinaj teatraĵoj. Krom teatraĵoj Tian Han skribis ankaŭ centojn da escoj, poemoj, komentarioj, rememoraĵoj kaj disertaĵoj. Oni povas diri, ke li estis la plej fekunda dramisto en la teatra historio de Ĉinio.

Tamen en la kultura revolucio li multe suferis persekutadon de la “kvarpersona bando”, kiu verŝis sur lin diversajn kalumniajn kulpigojn kaj ĵetis lin en malliberejon. En 1968 li mortis en la karceroj pro maljustaĵo. En aprilo de 1979 okazis en Beijing solena funebra kunveno por restarigi lian reputacion kaj nuligi maljustan verdikton pri li. La funebran kunvenon ĉeestis pli ol 2,000 personoj el la ĉinaj literaturaj kaj artaj rondoj, kaj ankaŭ gvidantoj de la Partio kaj registaro prezentis al li florkronojn. Mao Dun, fama veterana verkisto kaj vicprezidanto de la Tutlanda Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoj diris en sia parolado: “Tian Han estis fondinto de la ĉina revolucia teatra movado kaj pioniro de la teatra reformo. Li estis ankaŭ orga-

nizanto kaj gvidanto en la frua periodo de la revolucia muzika kaj filma arto de Ĉinio kaj faris grandan kontribuon al la disvolvo de la ĉina popola arta afero.

Nun, kiam ni vidas la gajan scenon de la geedziĝa festo de Sunzamkampo kaj princino Wencheng kaj la prosperecon de la literatura kaj arta fronto, ni ankoraŭ pli sopiras al nia eminenta dramisto Tian Han.



Sceno el la dramo “Princino Wencheng”: Wencheng esprimas al la imperiestro de Tang-dinastio sian deziron edziniĝi fore en Tibeto.



Princino Wencheng kaj Sunzamkampo en la dramo



La Birdo de Feliĉo

(Tibeta popolrakonto)

ILUSTRITA DE QIN HAN



ANTAŬ tre longe, en Tibeto troviĝis loko, kie estis nek riveroj kaj kampoj, nek varmo kaj floroj, nek arboj kaj herboj. Tieaj loĝantoj suferadis mankon de manĝaĵoj kaj vestoj dum la tuta jaro kaj neniu el ili vidis, kio estas feliĉo. Sed ili kredis, ke certe sin trovas feliĉo en la mondo.

Maljunuloj diris, ke feliĉo estas bela birdo, kiu loĝas sur tre tre malproksima neĝkovrita monto en la oriento. Ĉie, kien la birdo de feliĉo flugas, estiĝas feliĉo. En ĉiu jaro, iuj el la loĝantoj forlasis sian hejmon por serĉi la birdon de feliĉo, sed neniu el la foririntoj hejmen revenis. Oni diris, ke la birdon de feliĉo gardas tri monstroj kun longa barbo, kiuj povas mortigi homon per simpla ekblovo al siaj lipharoj.

En iu jaro, saĝa knabo Wanggyai (Vanggjaj) estis sendita por serĉi la birdon de feliĉo. Antaŭ la ekiro, knabinoj lin honoris prezentante al li

sekalan vinon kaj patrinoj ŝutis sekalon sur lian kapon laŭ tibeta kutimo dezirante al li bonan vojaĝon.

Multajn tagojn Wanggyai iris orienten kaj vidis fore grandan monton kovritan de neĝo disradiana kiel arĝento. Tiam subite aperis monstro kun nigra barbo, kiu grakis al Wanggyai:

“Kiu venis al mia loko? Kia aŭdaculo! Por kio ci venis?”

“Mi nomiĝas Wanggyai. Mi venas por serĉi la birdon de feliĉo!”

“Hahaha!” ekridegis la monstro. “Knabo tiel eta, kiel kok-ovo, eĉ kuraĝas veni al mia loko! Se ci volas vidi la birdon de feliĉo, unue mortigu la patrinon de Losang! Alie mi cin punos! Tia etulo kia ci ja ne bezonas mian personan forton por morti, ĉar ci jam pereos, se ci piedirados 33 ĉeval-etapojn sur gruzoj!”

“Mi amas mian patrinon,” diris Wanggyai, “kaj mi neniam mortigos alies patrinon. Faru kion vi volas!”

La monstro koleriĝis kaj tuj ekblovis siajn longajn lipharojn, en palpebruma daŭro la glata vojo turniĝis en gruzejon kun akraj ŝtonetoj similaj al tranĉiloj.

Kiam Wanggyai atingis la unuan etapon, liaj plandumoj estis truigitaj; kiam li atingis la duan etapon, liaj piedoj sangis vundite de la ŝtonetoj; kiam li atingis la trian etapon, ankaŭ liaj manoj jam ricevis vundojn. Ho, malfacilege! Ĉu li atingos la cellokon? Ĉu li povus jam sin turni hejmen? Ne, la samlokanoj atendas, ke li reportu feliĉon al ili. Wanggyai rampadis antaŭen. Ŝiriĝis liaj vestoj, vundiĝis liaj genuoj kaj sangis ankaŭ liaj brakoj. Apenaŭ li finis tiun pecon de vojo, li renkontis monstron kun flava barbo, kiu ululis kiel ventego.

“Ulululu! Se ci volas vidi la birdon de feliĉo, unue venenu maljunulon Soinam (Sojnam). Se tion ci ne povus, mi cin mortigos per malsato!”

Wanggyai jetis rigardon al la monstro kaj diris: “He! Kiel bele vi parolas! Mi amas mian avon, kaj mi neniam mortigos alies avon!”

La monstro kolere blovis siajn longajn lipharojn kaj la manĝaj-sako de Wanggyai tuj flugis en la aeron. La bela lando kun verdaj montoj kaj bluaj akvoj subite turniĝis en senliman dezerton. Nenion manĝeblan oni povis trovi en tiu loko.

Kiam Wanggyai atingis la unuan etapon, lia stomako murmuradis pro malsato; kiam li atingis la duan etapon, li sentis kapturigojn pro malsato; kiam li atingis la trian etapon, liaj intestoj doloregis al li pro malsato. Tian senton spertis nur tiuj kiuj suferis malsaton. Wanggyai multe trinkis el rivero kaj poste daŭrigis sian iron. Kiam li atingis la 33-an etapon, li fariĝis preskaŭ skeleto. Kaj tiam lin haltigis monstro kun blanka barbo, kiu kriis al li per tondra voĉo:

“Tondrondron! Tondrondron! Kiu mortospitulo venis al mia loko?”

Wanggyai respondis: “Mi nomiĝas Wanggyai. Mi venas por serĉi la birdon de feliĉo!”

“Se ci volas vidi la birdon de feliĉo,” diris la monstro, “prezentu al mi la okulglobojn de Baima! Se ci rifuzus tion, mi tuj elprenus ciajn okulglobojn!”

Wanggyai pripensis momenton kun klinita kapo kaj diris poste: “Kiel bele vi revas! La belaj pupiloj de knabino absolute ne devas esti tuŝitaj! Mi neniam elprenos la okulglobojn de Baima!”

La monstro blekadis de kolerego, ekblovis siajn longajn lipharojn, kaj je tio la okulgloboj de Wanggyai saltis el la okulgloboj kaj li blindiĝis. Wanggyai pensis: Tiu ĉi estas la lasta turmento al mi kaj per plua antaŭeniro en la direkto de sunleviĝo mi alvenos al la loko, kie loĝas la birdo de feliĉo.

Palpante la teron, Wanggyai trairis 33 ĉeval-etapojn, surgrimpis neĝkovritan montegon kaj tiam li aŭdis, ke la birdo de feliĉo diras al li:

“Aminda knabo, ĉu vi venas por vidi min?”

Wanggyai sentis kaj ĝojon kaj malĝojon. “Mi venas por inviti vin. La popolo en nia loko vin sopiradas ĉiutage, do bonvolu flugi al nia loko!”

La birdo de feliĉo karesis Wanggyai per siaj flugiloj kaj kantis por li. La okulgloboj de

Wanggyai revenis en liajn okulglobojn, sed sciis, ili fariĝis pli brilaj ol antaŭe; liaj vundoj malaperis kaj liaj muskoloj plifortiĝis. La birdo de feliĉo regalis lin per seka viando kaj frititaj kukoj kaj poste ĝi ekflugis, kun Wanggyai sur sia dorso, al lia hejmloko kaj falis sur apudan montpinton.


“Kion vi volas?” demandis la birdo de feliĉo.

“Ni volas varmon kaj feliĉon, arbarojn kaj florojn,” diris Wanggyai, “kaj ankaŭ kampojn kaj riverojn.”

La birdo de feliĉo kriis trifoje sur la monto. Je la unua krio, la ora suno trapenetris la nigrajn nubojn kaj varma vento blovis el la aero. Je la dua krio, aperis arbaregoj sur kaj sub la monto, ekfloris persikarboj kaj aliaj plantoj kaj ĉiuj birdoj komencis gaje kanti kun turdo kaj alaŭdo kiel primadonoj. Je la tria krio, aperis verdaj riveroj kaj kampoj kaj blankaj leporoj ekdancis sur herbejoj.

Ekde tiam, la popolo de la loko ne plu vivas en mizero.


(Redaktita de CHEN JIAJIN)





Suzhou— Akvoriĉa Urbo en Ĉinio

de HE LANG



Stona arkponto

JE ĉ. 90 kilometroj okcidente de Shanghai (Ŝanhajo) sin trovas Suzhou, tipa akvoriĉa urbo en suda Ĉinio.

Tiu ĉi urbo estas negranda. Ĝi havas totalan areon de 119.5 kvadrataj kilometroj kaj malpli ol 600,000 loĝantojn.

En la urbo ne estas altaj etaĝdomoj, nek larĝaj modernaj ŝoseoj. La loĝdomoj plejparte estas kun blankaj muroj kaj nigrategola tegmento. Pro abundeco de riveroj

multaj domoj frontas al stratoj kaj malantaŭe apudas al riveroj. La ŝtonŝtuparoj ĉe la riverobordoj, la arkpontoj super riveroj kaj la boatoj veturantaj tien kaj ĉi tien formas bildon de akvoriĉa lando en suda Ĉinio. Laŭ onidiro, en la 13-a jarcento la fama turisto Marko Polo vizitis ĝin kaj nomis ĝin "la Orienta Venecio".

Suzhou estas unu el la famaj antikvaj urboj en suda Ĉinio. Laŭ kroniko, frue en 560 a. K. de la periodo de Printempo kaj Aŭtuno de nia lando, la regno Wu prenis ĝin kiel sian ĉefurbon. Ĉe la komenco la urbo estis tre malgranda kaj okupis nur 1.5 kvadratajn kilometrojn. En 514 a. K. la regno Wu prosperiĝis kaj plivastigis la urbon ĝis la hodiaŭ-a skalo de la malnova urbo de Suzhou.

La malnova urbo de Suzhou havis ĉirkaŭmuron kun 16 pordegoj (i. a. estis 8 pordegoj kondukantaj al riveroj). En 1977 la administra fako por antikvaj objektoj de Suzhou riparigis kompare valoran Panpordegon por surtera kaj surakva trafiko kaj parton de la ĉirkaŭmuro,

tiel ke oni povas apreci restaĵojn de la urbo konstruita antaŭ pli ol du mil jaroj.

La atento de la vizitantoj estas altirata antaŭ ĉio de la pli ol 300 ŝtonpontoj super riveroj, inter kiuj estas pontoj kun multaj spanoj, larĝspanaj arkpontoj kaj ankaŭ pontoj kun malaltaj balustradoj kuŝantaj tuj super la akvosurfaco. La plej grandioza kaj pompa el ili estas ŝtonoponto kun 53 spanoj nomata Ponto de Trezora Zono, kiu situas en la suda parto de la urbo. Ĝi, longa 317 metrojn, estis konstruita dum la jaroj 816-819 p. K. La plej larĝa spano estas 7.45 metroj. Oni diris, ke por konstrui tiun ponton unu oficisto de Tang-dinastio oferis sian trezoran zonan, tial la ponto portis la nunan nomon.

Inter la vidindaĵoj de Suzhou, la Tigro-monteto en la nordokcidenta parto de la urbo estas la plej bela. Ĝi havas areon de pli ol 20 hektaroj. Tie troviĝas nemalmultaj pitoreskejoj kaj legendoj pri la reĝoj de Wu-regno. Eniru tra ronda ŝtonpordo ĉe la monttalo kaj vi alvenos al la Glavo-baseno. Ambaŭflanke



★ Beijing
○ Suzhou

de ĝi staras krutajoj. Sub ili estas fonto sufiĉe profunda. La Glavo-baseno estas tombejo de la reĝo de Wu-regno Helü. Oni diris, ke dum la vivo li plej ŝatis glavojn kaj post lia morto liaj sekvantoj enterigis en lia tombo kiel akompanaĵojn 3,000 glavojn, kiujn li konservis. Poste, la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (246-210 a. K.) informiĝis pri tio kaj sendis siajn subulojn por elfosi ilin. Anstataŭ la glavojn ili trovis fonton, kiun la posteuloj nomis Glavo-baseno. Nun oni ankoraŭ povas vidi sur la krutajo elegante gravuritajn ideografiaĵojn signifantajn "Glavo-baseno en Tigro-monteto".

Suzhou famiĝis ankaŭ pro siaj antikvaj ĝardenoj. En la historio de Suzhou, la nombro de ili superis 400. Ili ĉiuj estis loĝejoj de alt-ranguloj en feŭdaj dinastioj kaj diferencis de la imperiestraj ĝardenoj. La lastaj, kiaj la Somera Palaco en Beijing kaj Somera Vilao en Chengde, plejparte kombiniĝis kun imperiestraj palacoj, fundamente estis konstruitaj surbaze de naturaj montoj kaj riveroj aŭ lagoj kun aldono de diversaj florplantoj, tiel ke ili aspektas grandiozaj kaj pompaj. Tamen, la ĝardenoj en Suzhou okupis negrandan areon kaj la artisme kunordigitaj konstruaĵoj


kaj artefaritaj montetoj, basenoj kaj florplantoj en ili formis belajn vidaĵojn. Ekzemple, la Ĝardeno por Restado estis privata ĝardeno de granda burokrato de Ming-dinastio kaj havas historion de pli ol 400 jaroj. Kvankam ĝia areo estas nur tri hektaroj, tamen ĝi estas bone aranĝita, kaj formiĝis en ĝi pluraj pitoreskejoj diferencaj unu de alia. Meze de la ĝardeno la artefarita monteto, basenoj kaj belaj konstruaĵoj formis bildon de akvoriĉa lando en suda Ĉinio; en ĝia orienta parto etaĝdomoj kaj zigzagaj koridoroj formis komfortan loĝejon; kaj en ĝia okcidenta parto kreskas granda nombro da florplantoj kaj arboj. Ĉiuj pitoreskejoj interligiĝas per la zigzaga koridoro, longa je 0.5 kilometro. Promenante laŭ la koridoro, oni povas ĝui variantajn pejzaĝojn

La fama Ĝardeno de Sentalenta Administranto estas tute de alia stilo. Ĝia areo estas duoblo de tiu de la Ĝardeno por Restado. Akvo okupas ĉ. du trionojn de la tuta areo de la ĝardeno. En la ĝardeno oni konstruis etaĝdomojn, plantis florojn kaj arbojn, faris artefaritajn montetojn ĉirkaŭ la akvo kaj aldonis super ĝi zigzagajn pontojn kun malaltaj balustradoj, tiel ke la ĝardeno impresas per vasteco kaj heleco.

Krome, en la urbo sin trovas ankaŭ aliaj antikvaj ĝardenoj, kiel la Onduma Ĝardeno, Ĝardeno de Retmajstro kaj Leon-arbara Ĝardeno, kiuj ĝuas renomon tra la tuta Ĉinio

Suzhou estas ankaŭ grava produkto de silkajoj de Ĉinio, kaj havas historion de pli ol dumil jaroj en silkajproduktado. Laŭ kroniko, en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno la reĝo de Wu-regno Fuchai (495-477 a. K.) ŝatis amuzi sin sur akvo kaj la velo sur lia boato estis farita el atlaso. Hodiaŭ unu strato de la urbo estas ankoraŭ nomata "Atlas-vela Strato". En la 17-a kaj 18-a jarcentoj la produktado de silkajoj en Suzhou ricevis grandan disvolviĝon kaj tiu urbo fariĝis la centro de silkaja produktado en la tuta lando. La kortego instalas tekstilan buroon en Suzhou kaj sendis eŭnukojn por kontroli la produktadon. Nur en la mezo de la 19-a jarcento, la silka metiindustrio de Suzhou malprosperiĝis tagon post tago kaŭze de la invado de imperiismo. Post la Liberiĝo ĝi akiris novan vivon. Nuntempe en la urbo sidas 14 grandaj silkfabrikoj kaj formiĝis kompare kompleta industria sistemo de silkaja produktado kun bombikso-bredado, elbobonado de silkraŭpaj kokonoj, tinkturado, tekسادo kaj presado de silkajoj. Tie

La fama Okcidenta Ĝardeno de Suzhou





Strato en la urbo Suzhou

produktiĝas freŝkoloraj kaj molaj silkaĵoj de pli ol 300 specoj, kiuj estas varme akceptataj en kaj eksterlande.

Ankaŭ multaj tradiciaj metiartaĵoj de Suzhou, kiel brodaĵoj, ŝaltalaj ventumiloj, palisandraj kaj jadaj skulptaĵoj k. a., famiĝas en kaj ekster Ĉinio. Vizitantoj ŝatas

aĉeti kelkajn pecojn el ili kiel memoraĵojn.

Suzhou situas centre de la delto de Changĵiang-rivero (Jangzi-rivero). Ĝi estas loko ne nur bela sed ankaŭ riĉa je fiŝoj kaj rizo, kaj ĝi estas nomata "Paradizo en la Mondo". La gastronomio de Suzhou

ĝuas renomon kaj la Suzhou-aj pladoj okupas gravan lokon en la menuo de la ĉinaj tradiciaj pladoj. Multaj fremdlandaj turistoj, precipe revenintaj ĉinaj elmigrintoj, ŝatas Suzhou-ajn pladojn. Ankaŭ la kukoj kaj bombonoj de Suzhou, kiuj havas apartan guston, famiĝis en kaj ekster nia lando.



(Daŭrigo de p.45)

inter mi kaj tiu sovetunia verkisto vekis ilian scivolemon se ne miron. Multaj kameraoj samtempe direktiĝis al ni kaj aŭdiĝis tiktakoj. Tiam la atmosfero fariĝis tre vigla kaj varma. La prezidanto de la Internacia Konferenco de Verkistoj kamarado B. Pogaĉnik kaj angla verkisto Peter Elstob, la ĉefsekretario de la Internacia Plumo-

rondo, tuj venis al ni kaj fariĝis parto de la neatendite aperinta sceno.

Tiu neatendite varma sceno fariĝis simbolo de la "sukcesa fermiĝo" de la Internacia Konferenco de Verkistoj en Bled.

* La konferenco estis kunvokita de la Verkista Asocio de la Slovenia Respubliko de Jugoslavio kaj la

Slovena Plumo-centro, de la 8-a ĝis la 12-a de majo de 1979. La temoj de la konferenco estis: (1) "Literaturo kiel instrumento de nova universalismo"; (2) "Literaturo kiel ponto inter popoloj". Laŭinvite la ĉinaj verkistoj Ye Junjian kaj Huang Gang partoprenis en la konferenco. Ili estis la unuaj ĉinaj verkistoj, kiuj vizitis Jugoslavion post multaj jaroj.

Prí la Somera Kampado en Qingdao

de Lao Bai



EN aŭgusto ĉijare, okazis la Tutlanda Sporta Somera Kampado de Mez- kaj Elementlernejoj en Qingdao, bela apudmara urbo. En ĝi partoprenis 570 geknaboj de pli ol 30 naciecoj, kiuj estis elstaraj en sia lernado kaj aktivaj en sporto.

HO, MARO, MI AMAS VIN!

Dum la somera kampado la geknaboj vivis tre intime. Kien ili venis, tien ili alportis kantadon kaj gajecon. Ili plej ŝatis naĝadon. Ĉe ĉiu naĝo ili konkure kuris en la maron kaj prezentis sian arton. Lertaj naĝantoj libere naĝis en ondoj, dum komencantoj kun granda ĝojo postkuris ondojn frapantajn la bordon.

Ludo sur plaĝo estis interesa sporto. Ĉi tie la plaĝo servis kiel sportejo. Tuj post la pafado la geknaboj ekkuris de la maro al la bordo. Estis multe pli malfacila la kuro sur mola sablo, ol sur solida tero. Krome tie iris ankaŭ konkursoj de longsaltado, ŝnurtirado kaj ĵeto de pilko en korbon.

Iun serenon antaŭtagmezon ĉiuj partoprenantoj de la kampado kolektiĝis en la ombrejo de la Shandong-a Oceanografia Instituto kaj intervidiĝis kun oceanografoj de nia lando. Dekkelkaj oceanografoj de la malnova generacio venis inter la geknabojn, intime interparolis kun ili kaj respondis iliajn multajn demandojn. Profesoro He Chongben kun la aĝo de pli ol 70 jaroj rakontis al ili pri la maro kiel origino de la vivaĵo, ĝia konsisto, ĝia fizika ŝanĝiĝo kaj trezoroj en ĝia fundo, kaj la utiligo de maro en servo al la homaro. Li kuraĝigis ilin bone pose-

di fundamentajn sciojn kaj diligente lerni sciencojn kaj esperis, ke en la proksima estonteco pli multaj aliĝos al la oceanografia rondo.

Tiutage, la geknaboj venis en la Oceanografian Instituton Dependan de la Ĉina Akademio de Sciencoj, vizitis tie laborejojn de sciencaj laborantoj kaj vidis diversspecajn specimenojn de maraj animaloj kaj vegetaloj.

Dum la somera kampado oni aranĝis maran navigadon por la partoprenantoj. Sur iu surteriĝa ŝipo mararmeanoj konigis al ili la strukturon de la ŝipo, ĝian kapablon kaj diversajn signojn por naviglinio. Dum la navigado, la lastaj rigardis militan prezentadon de la formacio de torpedŝipoj, kaj kamuflon fumadon.


La sciencaj scioj larĝigis la vidkampon de la geknaboj. Iu mezlernejo veninta el montregiono notis en sia taglibro: "Ho, maro, mi amas vin! Vi estas grandega trezorejo. Tamen la ŝlosilo de la trezorejo estas en la mano de scienlistoj. Mi volas fariĝi oceanografo kaj deĉifri la misteron de la maro per akiritaj scioj."

GRIMPADO SUR LAOSHAN-MONTO

Sonora klarionado vekis ĉiujn profunde dormantajn lernejojn kaj alia tago komenciĝis.

Ĉiuj ekstreme ĝojiĝis, informiĝinte pri grimpo sur Laoshan-monto.

La monto estas unu el la vizitindejoj en Qingdao. Duono de la monto sin tuŝis kun la maro kaj la alia duono kun la tero. Ondoj akompanis kuriozajn montpintojn kaj tiel ĉarmis la pejzaĝo sur la akvo kaj monto. La aŭtobusoj



Knabino Liu Lifan altsaltas.

veturis laŭborde, kaj flirtis en vento la kampa-deja blanka-blua standardo, kiu simbolis purecon kaj maron. Aŭdiĝis de tempo al tempo gaja kantado el la aŭtobusoj.

Post veturado de ĉ. 3 horoj ili atingis la piedon de la monto. Paŭzinte kelkan tempon ili komencis grimpi. La knaboj konkure grimpadis antaŭe, kaj ilin sekvis la knabinoj. Iom poste, ili ĉiuj ekŝvitis tutkorpe. Subite demandis iu knabino veninta el la Nord-ĉinia Ebenaĵo: “Kial oni nomas tiel belan monton Laoshan-monto?” La direktantino respondis: “Kvankam Laoshan-monto estas pli ol 1,200 metrojn alta super mar-nivelo, tamen ĝi havas altajn pintojn kaj krutajn deklivojn. Kiam oni grimpas, oni sentas sin laca; tial oni donis al ĝi tiun nomon. (“Lao” en la ĉina lingvo signifas lacon.)

Tiam la direktantino rimarkis, ke iuj vere iom laciĝis, kaj montris sprite la alfrontatan pli-ol-10-metran falakvon, dirante: “Rigardu, jen la fonto de Laoshan-monto.” Forgesante lacon, ĉiuj alkuris al malgranda baseno kaj vidis fonton, en kiu fluetis klara akvo.

Jin Yong, lernanto de la korea nacieco, trinkis buŝon da akvo kaj forviŝis akverojn ĉe la

buŝanguloj, diris ĝoje, ke li trinkis akvon de Tumen-rivero en sia hejmloko, trinkis ankaŭ akvon de Yalu-rivero kaj hodiaŭ trinkis akvon el la fonto de Laoshan-monto. Kiel dolĉa estis la akvo de la patrolando!

SPORTKUNVENO

En la bolanta atletika sportejo estis iranta sportkunveno. Malsame al la antaŭaj sportkunvenoj, ĉifoje la ludoj kaj grupoj estis dividitaj laŭ aĝo kaj sekso. La sportistoj ne konkuris pri lokoj, sed strebis por atingi aŭ superi la normojn de korpaj ekzercoj difinitajn de la ŝtato por la mez- kaj element-lernejanoj. La 15-jara Liu Lifan estis metita en la unuan knabinan grupon. En la konkurso ŝi transsaltis la stangon 1.47 metrojn altan kaj superis la difinitan normon je 0.47 metro. Kaj tiam ŝi estis nur 1.54 metrojn alta. La 16-jara Wang Hui estis en la dua knaba grupo. En la centmetra sprinto li kuris 13.2 sekundojn kaj superis la difinitan normon de 14.4 sekundoj. La nun praktikataj “Ŝtataj Normoj de Korpaj Ekzercoj” koncernas pli ol dek ludojn, kaj ĉiu lernanto povas elekti 6-7 el ili. Ĉiu, kiu atingos la normojn, ricevos ateston pri kvalifikiteco. Plejparto de la partoprenantoj de la kampado jam atingis la normojn en siaj lernejoj. Nur malmultaj ne ekzamenitaj devis meti sin al la denova ekzameno. Inter la 570 partoprenantoj preskaŭ ĉiuj atingis la difinitajn normojn.

Nia eduka principo estas kulturi lernantojn disvolvigitaj ĉiuflanke, morale, intelekto kaj korpe. Tion profunde komprenis ĉiuj lernantoj. Fu Chunmei, mezlernejano de mongola nacieco, diris en kunveno por interŝanĝi spertojn en lernado, ke dum ŝi lernis en la elementa lernejo, ŝi ne ŝatis sportojn, tial ŝia sanstato estis tre malbona kaj ŝi ofte suferis malsanojn. Ŝi ankaŭ havis grandajn malfacilojn en lernado. Sed poste, helpate de sia instruisto, ŝi komencis ekzerci sin per sprinto kaj longdistanca kuro, altsaltado kaj longsaltado, kaj fine ŝi fariĝis membro de la atletika teamo de la lernejo. Ŝia korpo fortikiĝis kaj ŝia forto grandiĝis. Kiam ŝi vizitis mezlernejon, ŝi lernis pli kaj pli bone.

El la partoprenantoj de la kampado nemalmultaj havis talenton en sporto. Por tio la kampadeja gvidantaro invitis eminentajn sportajn laborantojn helpi ilin. Song Meihua, gajninto de ora medalo en la Sepa Azia Sporta Festivalo, prezentis sian sperton en mez- kaj longdistancaj kuroj kaj helpis iujn partoprenantojn en ilia ekzercado.

* * *


Pasis duonmonato. La geknaboj kun haŭto brunigita de la suno, akvo kaj sablo, kun bona impreso pri Qingdao kaj kun intima amikeco inter la gelernejanoj, adiaŭis la grandan maron kaj revenis al siaj lernejoj, renkontante la novan semestron.





Pomologo Tao

Zunhu



Tao Zunhu kompilas pomologian materialon.

EN frua aŭtuno ni vizitis la malgrandan montvilaĝon Taojiakuang en la antaŭurbo de Weihai, Shandong-provinco, kie abunde produktiĝas fruktoj kaj loĝas pomologo Tao Zunhu.

Veninte en la vilaĝeton, ni estis tuj ravitaj de ĝia pitoreska pejzaĝo. Supre de la montoj verdas pinoj kaj kverkoj, kaj ĉe la monttalioj prosperas fruktoĝardenoj. Pomoj brilas en foliaroj, famaj longkolaj piroj de Shandong klinas per sia pezo la branĉojn al la tero, kaj aromas grapoloj de vinberoj similaj al perloj kaj sukcesaj bidoj. En la vilaĝo ĉirkaŭata de verdaĵoj, naivaj infanoj sin amuzas per persekutado, kaj gemaljunuloj kun ventumiloj en la mano sin freŝigas sub arboj...

Kelktaga vizito multe impresis nin. Ni admiras ne nur la poezian fruktoproduktejon, sed ankaŭ pomologon Tao Zunhu.

Tao Zunhu kun aĝo de 71 jaroj dediĉis jam plejparton de sia vivo por kulturado de fruktaroj kaj akiris sperton en tio. Dum pli ol 20 jaroj li prezentis, laŭ invito, siajn teknikojn en pli ol 100 fruktoproduktaj unuoj de 5 provincoj kaj urboj, kaj akceptis hejme pomologojn, kiuj venis el pli ol 20 provincoj kaj urboj por lerni de li. Li verkis kaj publikigis 15 disertaĵojn pri pomologio kaj per tio kontribuis por disvolvi la produktadon de fruktoj de nia lando.

En la pasinteco la montoj de Taojiakuang estis kalvaj kaj troviĝis sur ili neniuj pomarboj krom malmultaj pir- kaj abrikotarboj. Poste iu

fremdlandano alvenis kaj konstruis tie fruktoĝardenon per dungitoj el la urbo Weihai. Ĉiun aŭtunon la rikoltitaj pomoj estis transportitaj eksterlanden. La lokanoj povis nur rigardi sed ne gustumi la pomojn. Vidante tion, la juna Tao tre indigniĝis. Li sin demandis: Kial ni ĉinoj ne povas kulturi fruktarojn sur nia propra tero, se la fremdlandano povis krei fruktoĝardenon? Patriotismo brulis en lia brusto, kaj li decidis fariĝi pomologo. Li ĉiamaniere havigis al si branĉojn kaj faris provan greftadon al kelkdek arboj per metodo lernita en lernejo. Dank' al lia plurjara zorgema flegado ili ekdonis bon-gustajn fruktojn.

Post la Liberiĝo la popola registaro metis grandan atenton sur la fruktan produktadon, kaj tio multe kuraĝigis lin. En la jaro 1955, en kiu efektiviĝis agrikultura kooperado, li estis elektita kiel vicestro de la Taojiakuang-a Fruktoprodukta Kooperativo. Depost tiam li gvidis la vilaĝanojn en ekspluatado de la montoj kaj plantado de fruktarbidoj sur pli ol 10 hektaroj da kampoj.

Li koncentris sian ĉefan energion por esplori, kiel oni ebligas al junaj arboj pli frue kaj multe fruktdoni. Tage li laboris en la ĝardeno kaj samtempe observadis kaj faris notojn pri la fruktaroj; nokte li faris esploradon, konsultante materialojn. Li trovis gravan vojon por akiri riĉan rikolton de fruktoj, ke oni devas atente kulturi fruktodonajn branĉarojn de junaj arboj krom laŭplana stucado al ĉefaj branĉoj. Dank' al kelkjara praktikado li resumis kompletan meto-

don en kulturado de fruktodonaj branĉaroj kaj tiel altigis la produktokvanton de pomoj. La hektara produktokvanto de pomoj en 1959 pliiĝis je pli ol 7,000 kg. ol tiu en 1958. Estas menciinde, ke la pomarboj sur 0.09 hektaro da eksperimenta kampo produktis 8,300 kg. da fruktoj. Poste li verkis disertaĵon pri tio, legis ĝin en simpozio okazigita de la Pomologia Instituto de Shandong-provinco kaj ricevis laŭdojn de la ĉeestantoj pro tio.

En frua vintro de 1965, Tao Zunhu kaj aliaj 17 pomologiaj labormodeloj kolektiĝis en fruktogardeno de Tangshan, Hebei-provinco, kaj faris stucan demonstracion. La 18 tondiloj samtempe laboris, kaj la unika tondmaniero de Tao Zunhu ricevis multajn laŭdojn de la vizitantoj. Depost tiam la nomo de Tao Zunhu cirkuladis tra la lando. Pro lia sukceso en pomologio li estis honore titolita de la popola registaro per "labormodelo" kaj ĉeestis, laŭ invito, la Tutlandan Konferencon de Labormodeloj kaj Herooj. Alta honoro kaj granda kuraĝigo stimulis lin al plia strebado al pomologia afero.

Ĉiutage li ne nur faris eksperimentadon en la ĝardeno, sed ankaŭ akceptis kolegojn de aliaj lokoj, kiuj venis por konsulti lin. Li profunde sentis, ke li ne havas sufiĉe da tempo por disponigi. Foje, kiam li venis al la ĝardeno post matenmanĝo, li trovis, ke arbido unu metron alta kreskas ĉe iu kaduka fruktarbo. Tiu fenomeno de "rejuniĝo" tre interesis lin. Li cerbumadis: Se oni greftos branĉon sur ĝin, ĝi povos kreski

samtempe kun la maljuna kaj anstataŭos la lastan post ties morto. Li tuj komencis greftadon kaj laboradis ĝis la dua horo p.m., eĉ forgesante tagmanĝon.


Pro longa peniga laborado li iom post iom malfortiĝis, kaj malsano lin turmentadis. Sub admonado de aliaj kamaradoj, li enhospitaliĝis por ricevi kuracadon, sed lia koro ĉiam sin direktis al la ĝardeno. Ĉiufoje, kiam kadroj kaj aliaj kamaradoj vizitis lin, li unue demandis ilin, kiel status la laboro de la ĝardeno. En la lastaj jaroj, kvankam li estis malsana, tamen li persistis en eksperimentado. Tage, li venis kun lambastono al la ĝardeno kaj faris observadon kaj eksperimentadon, kaj nokte li kompilis teknikajn materialojn sub lampo. Kelkfoje li ne povis daŭrigi sian laboron pro malsano, li diktadis al sia filo. Li verkis pli ol 10 artikolojn pri pomologiaj teknikoj kaj publikigis ilin en periodaĵoj de la provinco kaj la lando, kiuj ludis bonan rolon en disvastigo de ĉi-flankaj teknikoj.

En la jaro 1977, li komencis fari eksperimentadon en malaltigado kaj densa plantado de pomarboj. La tiel kulturitaj arboj frue kaj multe fruktodonas, iliaj fruktoj bongustas, kaj krome ilia kulturado estas oportuna por meĥanika flegado. Li elektis 3 muojn da tero sur deklivo de la Suda Monto kaj plantis pli ol 600 arbojn. Nun la arboj zorgeme kulturitaj de li bone kreskas. Iliaj trunkoj rekte staras kaj iliaj branĉoj sin klinas kiel tiuj de plorsalikoj. 30% de ili jam donas fruktojn.


*Tao Zunhu instruas
kiel kulturi fruktarbojn.*




Parto de la kampo de Taojiakuang



Xiao Xuesheng:



INSTRUISTINO EL MJAŬ-NACIECA MONTREGIONO



LUO Zhengfen estas mia amikino interkonatiĝinta kun mi ĉisomere dum vizitado kune kun la vizita grupo de la tutlandaj nacimalplimulto. Ŝi ne estas fama, nek faris mirindajn aferojn, tamen, mi ne scias kial, tiu ordinara knabino profunde restas en mia memoro. . .

Dum iu tagmanĝo, nelonge post kiam la vizita grupo alvenis al Beijing (Pekino), iu mjaŭa knabino sidis apud mi. Ŝi estis 21-22-jara kun bela vizaĝo kaj ĝentila maniero. Eble pro hontemo, ŝi nur silente manĝadis kun la kapo klinita.

Pro profesia kutimo de raportisto mi iniciate parolis al ŝi: “Ĉu vi unuafoje vizitas Beijing?” “Ne, mi jam vizitis ĝin en 1977, kiam mi ĉeestis la Tutlandan Kunvenon de Lerno de Dazhai en Agrikulturo.”

“Do, vi estas agrikultura labormodelo.”

Ŝi ĵetis rigardon al mi kaj ekridetis afable, dirante: “Vi misdivenis. Mi estas montvilaĝa instruistino.”

Kaj tiel ni interkonatiĝis. Ŝi nomiĝas Luo Zhengfen kaj laboras kiel instruistino en la montregiono de Rongjiang-gubernio en sudorienta parto de Guizhou (Gujōu)-provinco.

Estis interesa epizodo en la infana aĝo de Luo Zhengfen. Iufoje Luo Zhengfen estis iranta sur strato kune kun sia patrino kaj diris abomene: “Kiel malpure!” vidante ke mjaŭaj vilaĝanoj vektoportas brullignojn kaj ŝvitegas. Aŭdinte tion, ŝia patrino tre miris kaj diris al ŝi riproĉe:

“Malgranda Fen, ankaŭ vi estas mjaŭo, kial vi abomenas ilin? Vi devos iri en mjaŭ-an vilaĝon por hardi vin, kiam vi plenkreskiĝos!” En 1973, Luo Zhengfen diplomitiĝis el malsupera mezlernejo kaj ne vizitis superan mezlernejon. Akirinte konsenton de ŝia patrino, ŝia patro, poŝtoŝefo de la regiono, efektive sendis sian filinon al mjaŭ-a montvilaĝo.

La loko, kie Luo Zhengfen laboris, nomiĝas Yesuo-vilaĝo, kiu distancas de la gubernia urbo je pli ol 40 kilometroj. Tie troviĝas multaj montegoj, la trafiko malfacilas pro manko de ŝoseo, la produktado estas kompare postĝinta kaj la vivtena nivelo de vilaĝanoj nealta. La tuta vilaĝo havas 23 familiojn kaj tre malmultaj homoj scipovis legi kaj skribi. Tie ne troviĝis lernejo por la infanoj. Antaŭ kelkaj jaroj, la vilaĝo fondis elementan lernejon kaj invitis instruiston, tamen la lasta baldaŭ foriris pro nealkutimiĝo al tiea vivo. Ĉifoje, maljuna Luo, sekretario de la komunumo, persone sendis Luo Zhengfen al la vilaĝo, por ke ŝi funkciigu tie lernejon. Maljuna Luo diris al ŝi kun kora espero: “La loko bezonas vin, bonvolu resti ĉi tie!”

En la inaŭgura tago de la lernejo, Luo Zhengfen purigis la klasĉambron kaj ĝoje atendis geknabojn. Ŝi atendis kaj atendadis, sed alvenis nur ses geknaboj. Pro tio ŝi tiel ĉagreniĝis, ke nokte ŝi kaŝe ploradis kaj eĉ volis hejmen iri. Iufoje ŝia patro vizitis kaj pacience admonis ŝin: “La popolo nutris kaj klerigis vin. Ĉu vi volas ke ĉi-tieaj geknaboj restu analfabetoj?” Ankaŭ la

sekretario kaj kadroj de la komunumo ŝin vizitis. Ili tre ĝojis, kiam oni denove starigis lernejon en la izolita vilaĝo. La kadroj diris al ŝi: “Ne malpacientiĝu! Ankaŭ estos bone, se vi unue klerigos por ni la ses geknabojn.”

Luo Zhengfen ne komprenis, kial vilaĝanoj ne volas sendi siajn infanojn al la lernejo, kiam ili tiel bezonis klerulojn. Por trovi respondon ŝi faris vizitojn al familioj en libertempo. Poste, ŝi iom post iom komprenis, ke iuj vilaĝanoj timas, ke ŝi ne povas alkitimiĝi al tiea malfacila vivo kaj foriros post kelkaj tagoj, aliaj tenas siajn infanojn hejme por prizorgi siajn junajn gefratojn, triaj estas tiel malriĉaj ke ili eĉ ne povas pagi la lernokostojn. Tamen, kiam Luo Zhengfen pensis la esperon de la vilaĝanoj al ŝi, ŝi ricevis grandajn konsolon kaj forton.

En la dua semestro, Luo Zhengfen decidis lasi la lernantojn viziti lernejon kunportante siajn junajn gefratojn. Ĉar tie estas montregiono riĉa je diversaj sovaĝaj plantaĵoj, ŝi organizis la lernantojn por kolekti arbutojn kaj bambuidojn printempe, fungojn somere kaj arbosemojn aŭtune. Pro tio la enspezo de la lernejo iom post iom plimultiĝis kaj la familioj de la lernantoj ne plu bezonis pagi la lernokostojn. Krome Luo Zhengfen ankaŭ aĉetis per iom el la enspezita mono instrumentojn por amuzo kaj sporto por la lernantoj kaj ludilojn kaj bombonojn por la infanetoj. La lastaj ludis ludilojn, manĝis bombonojn kaj ne plu ĝenis la lernantojn dum leciono. Post nelonge la lernejo jam havis 31 lernantojn. Ne nur la lernaĝaj infanoj de la tuta vilaĝo ĉiuj ekvizitis la lernejon, sed ankaŭ kvin infanoj, kiuj ne atingis lernaĝon, sidis flanke en la klasĉambro kaj silente aŭskultis.

Kompreneble, Luo Zhengfen havis pli multe da laboro ol urba instruisto. Ŝi instruis ne nur lingvon kaj aritmetikon, sed ankaŭ kantadon kaj pentradon. Tage ŝi donis lecionojn, nokte ŝi iris al diversaj lernaj grupoj por kontroli lernadon de lernantoj. Je la fino de ĉiu semajno ŝi kaj la lernantoj purigis la vilaĝon. En la fino de semestro ŝi helpis lernantojn prepari artan programon por fari prezentadon al fameliestroj de lernantoj. Kvankam Luo Zhengfen malgrasiĝis pro penado, tamen ŝi sentis, ke la vivo plenas je




Luo Zhengfen (la dua de dekstre) kaj elmigrantaj ĉinoj sur la Granda Muro

signifo kaj feliĉo. La vilaĝanoj, ĉu junaj aŭ maljunaj, ĉiuj rigardis ŝin kiel sian parencon. Ŝi finfine fariĝis nova membro de la vilaĝo.

Pasis kvin jaroj. La unuaj elementlernejoj edukitaj de ŝi jam diplomitiĝis. Iuj el ili nun laboras kiel kontistoj de produktaj taĉmentoj, aliaj kiel nudpiedaj kuracistoj, kaj triaj sukcesis eniri en gimnazion.

Poste pro bezono de laboro, Luo Zhengfen estis transpostenigita por labori kiel instruistino en la gimnazio de la komunumo. Tamen ŝi ankoraŭ kore zorgas Yesuo-vilaĝon, ofte vizitas ĝin kaj donas sian instruajn sperton al la instruistino, kiu daŭrigas ŝian laboron.





Anasovoj kun du ovoflavoj

EN frua somero mi vizitis Gaoyou, la produktadon de la famaj paser-koloraj anasoj de Jiangsu (Giangsu)-provinco. Ĝi vere meritas la nomon Gubernio de Anasoj. Grupoj kaj grupoj da grasaj anasoj paŝtigis ĉie sur lagbordoj, ĉe vilaĝandoj kaj en riveroj. Iuj, pelataj survoje, gakadis balanciĝante, aliaj senbrue serĉis nutraĵon, triaj petolis surrivero, kaj kvaraj kun etenditaj flugiloj flirtis postkurante unu alian.

Gaoyou kun modera klimato kaj abunda pluvokvanto estas sur la ebenaĵo de norda Jiangsu. En ĝi troviĝas multaj riveroj kaj lagoj, kaj pli ol du trionoj de ĝia totala areo estas akvejoj. Tio donas favorajn kondiĉojn por bredi anasojn. Dank' al sia longa penado la tiea laboranta popolo kulturis grasajn, viando- kaj ovo-donajn, bonrasajn anasojn — paserkolorajn anasojn de Gaoyou. Tiaj anasoj estas adaptiĝemaj al la medio, tre kapablaj en nutroserĉado kaj rezistemaj kontraŭ malsanoj kaj povas elteni varmegon kaj froston. Ili facile dikiĝas kaj multe demetas ovojn. Eĉ dumonata anaso jam pezas je ĉ. 2.5 kilogramoj, kaj unu plenkreska anasino demetas 160 ovojn jare.

Kiam mi vizitis la bredejon de bonrasaj anasoj de Gaoyou, la tiea respondeculo akompanis min dum la ĉirkaŭrigardado. Li konigis al mi, ke tiu bredejo plenumas la taskon de selektado kaj ĉiujare liveras bonrasajn paserkolorajn anasojn al la provinco kaj la gubernio. Kurantjare la bredejo jam vendis al la ŝtato pli ol 2,000 anasojn kaj pli ol 260,000 anasovojn. Nun estas bredataj tie pli ol 10,000 anasoj. Li malfermis ovokorbon kun tre grandaj anasovoj, el kiuj deko aŭ dekduo jam pezas kilogramon. Tiaj estas la Gaoyou-aj anasovoj kun du ovoflavoj.

Nun, ĉiuaprile kaj ĉiumaje, videblas ĉie en tiu ĉi akvoriĉa loko grupoj kaj grupoj da lanugaj anasidoj. Antaŭe oni kutimis en julio elovigi anasidojn, konatajn kiel aŭtunaj anasoj, kiuj povas produkti ovojn nur en la sekvanta printempo, t.e. post 200 tagoj. En la jaro 1975 la bredejo komencis esplori novan metodon por anasbredado. Venkinte la malfacilojn de malalta temperaturo en frua printempo kaj facila malsaniĝo de junaj anasoj, la bredejo sukcese provis elovigi en aprilo fruprintempajn anasojn. Tiaj anasoj povas plenkreski en relative mallonga

tempo kaj multe produkti ovojn, maksimume 293 ovojn jare. Krome, la printempaj kaj aŭtunaj anasoj povas esti bredataj sinsekve. Kaj la fruprintempaj anasoj emas demeti ovojn kun du ovoflavoj. De kiam la bredejo komencis bredi fruprintempajn anasojn, pli ol 10.75% de la ovoj demetitaj havis po du ovoflavojn.

La Gaoyou-anoj estas tre lertaj en bredado de anasoj. Frumatene, je la kvara horo, oni jam komencas paŝti anasojn. Tiam roso ankoraŭ ne vaporigis kaj la insektoj kaj salikokoj estas en dormo, kaj estas oportune por la anasoj serĉi nutraĵon. Ĉiu anasgrupo konsistas el 500-600 aŭ eĉ pli ol 1,000 anasoj. Post ĉiu grupo anasbredisto, kun longa bambustango en la manoj antaŭenmovas boaton. Mi rigardis anaspaŝtadon de la 50-jara bredisto Sun Wanqiang. Li stabile remadis boaton, tuj sekvante sian anasgrupon. Kiam la anasgrupo venis en branĉan fluon ĉe fragmitejo, li haltigis la boaton per la remstango, kaj la anasgrupo rapide alnaĝis kiel tajdo laŭ la boatrandoj. Sun Wanqiang tuj komencis ilin kalkuli. Li fiksas la rigardon sur la rapide preternaĝantaj anasoj, murmurante la ciferojn. En eta momento li jam finkalkulis la pli ol 1,250 anasojn. En modernaj brutobredejoj oni plenumas tian kalkulon per elektra aparato sur speciala pasejo. Sed tie ĉi la anasbredisto povas kalkuli la anasojn rapide kaj precize nur per siaj nudaj okuloj.

Kiam la anasgrupo disiĝis por serĉi nutron, iu febla anaso postigis kaj ne havis forton por kuratingi siajn kunulojn. Mi vidis tiam, ke Sun Wanqiang levis kaj turnis la longan, glatan bambustangon kaj per unu ĝia fino kroĉis la kolon de tiu anaso, kaj ĉe antaŭenmoviĝo de la boato kaj altiro de la remstango li kaptis per etendita mano la feblan anason kun frapantaj flugiloj.

La rapida kalkulado de Sun Wanqiang kaj lia kapto de anaso per remstango tute similis al brila akrobataĵo. Sun Wanqiang diris, ke ĉion tion li lernis de sia patro. En sia 11-jara aĝo Sun jam komencis lerni, de sia patro, bredadon de anasoj. Kvankam ili ambaŭ estis lertaj bredistoj en la malnova socio, tamen ili ne povis


vivteni la tutan familion kaj devis forlasi sian hejmlokon kaj fuĝi aliloken por almozpeti. Post la Liberiĝo la Popola Registaro asignis laborpostenon al Sun, kaj li fariĝis laboristo de la anasbredejo.

Bredado de anasoj en akvoriĉa loko povas akceli la agrikulturan produktadon kaj altigi la vivnivelon de la popolo, pri kio mi ricevis profundan impreson dum mia kelktaga restado en Jiruan-brigado. En la jaro 1978 tiu brigado bredis pli ol 6,200 anasojn kaj vendis al la ŝtato pli ol 4,500 anasojn kaj 1,900 kilogramojn da ovoj. En la lastaj jaroj la brigado akumulis por sia kolektivo pli ol 47,000 juanojn. Ĝi aĉetis unu

Anasoj transportataj al alia loko



grandan traktoron, 3 promenotraktorajn, 35 rizidtransplantajn maŝinojn, 15 draŝilojn kaj aliajn agrikulturilojn. Ĝi ankaŭ konstruis drenan-irigacian pumpstacion. Dume granda kvanto da anasa fekaĵo estis uzata kiel sterko, kio altigis la agrikulturan produktivon. En la lastaj du jaroj la hektara produktokvanto de greno atingis 7,860 kilogramojn. Ĉiu el la 1,151 membroj de la brigado enspezis pli multe en la pasinta jaro. Ĉiu membro de la dua produkta taĉmento ricevis 400 kilogramojn da tritiko dum unu rikolto. Krom kolektive bredi anasojn, la taĉmentoj ankaŭ kuraĝigis la familiojn de siaj membroj bredi paserkolorajn anasojn. Qin Shouxin, komunumano de la dua produkta taĉmento, estas sperta lertulo en bredado de anasoj, li ankaŭ havas rimarkindajn atingojn en la produktado de familia bredo. Lia tuta familio kun sep anoj loĝas en kvar-ĉambra tegol-tegmenta domo kun larĝa korto, kie kreskas ses morusarboj kaj petolas grandaj kaj malgrandaj kokoj kaj anasoj. Li diris al mi, ke ĉi-jare li bredas 30 anasojn, 12



Anasoj

kokojn, 4 anserojn kaj ankaŭ 3 porkojn. Lia familio havas brakhorloĝojn, pendolhorloĝon, transistoron, kudromaŝinon ktp. Li ankaŭ depenis sumon da mono en banko por subteni la socialisman konstruadon.



ANAŝIDOJ DE LA PRODUKTA TAĈMENTO



NOVA FOTOALBUMO “ĈINAJ PEJZAĜOJ”

La nomita kolekto de 211 koloraj fotografiaĵoj prezentas 15 ĉefajn pitoreskejojn, inkluzive de Lijiang-rivero, la Okcidenta Lago, Huangshan-monto, Lushan-monto, Taishan-monto, Huashan-monto, la Granda Muro kaj la montego Qomolangma, kaj historiajn vidindaĵojn de 13 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj inkluzive de Taiwan-provinco.

La klarigoj pri la bildoj estas en la angla kaj ĉina lingvoj. Krome en la albumo troviĝas ankaŭ klarigo en la franca, germana, hispana kaj japana lingvoj.

36.4 X 25.9 cm.

Tolbindita kun kolora plasta travidebla polvoŝirmilo Prezo: US\$ 39.00

Lukse bindita en brokata skatolo Prezo: US\$ 90.00

Eldonanto: Eldonejo de “Ĉinio”, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Beijing, Ĉinio

Mendu ĉe vialoka peranto aŭ rekte al P.O. Kesto 399, Guozi Shudian, Beijing, Ĉinio



KIOM DA INFANOJ ŜI HAVAŜ

(Daŭrigo)

III

Nelonge post la liberiĝo de Beijing (Pekino), la Departemento pri Unuecfrota Laboro de la Centra Komitato de la Kompartio bonvole kunvokis renomajn personojn de diversaj rondoj al la Hotelo Beijing por kunveno. Dum la plurtaga kunsido, ŝi ĉiam tenis sian buŝon fermita kaj diris nenion.

Antaŭvespere de la epokfara solena inaŭguro de la Popola Respubliko, Lin Qiaozhi ricevis inviton al tiu soleno. Kia honoro tio estis, tamen ŝi ne iris al ĝi. Vere nekomprenebla sinteno.

Ŝi multe pensis. La specifaj travivaĵoj de jardekoj pli kaj pli forte konvinkis ŝin, ke por vivi home oni bezonas subtenon de spirita forto. Laŭ ŝia opinio, tia spirita forto estas abstrakta kredo, enkorpiĝo de sankteco, kiu havas nenian rilaton kun la reala mondo, nek devas ŝanĝiĝi kun la realo. Ondegoj sin jetadis al ŝi, kaj ŝi instinkte ekskreciis pli kaj pli multe da kalcio por fortikigi sian ŝelon kaj sin kaŝadis en la spirita konko. Ŝia sola interligo kun la reala vivo estis akuŝigado kaj kuracado.

Kaj en tiu tempo iu pacientino, akompanata de laborantino de la Ĉina Virina Federacio, vizitis ŝin en la kliniko. Tiu virino en simplaj vestoj estis tre afabla. Ŝi petis la kuracistinon fari al ŝi ordinaran ginekologian ekzamenon. Dum la ekzamenado, Lin Qiaozhi demandis ŝin: "Ĉu vi iam naskis infanon?"

La virino diris al ŝi, ke ŝi naskis infanon antaŭ tre tre longe. Tio okazis en la jaro 1927, en iu tre malgranda hospitalo. Ŝi naskis viran bebon kun pezo de 9 funtoj, grasan kaj amindan. Sed bedaŭrinde, la infano baldaŭ mortis de malsano.

Tiam malamikoj persekutadis ŝin kaj klopodis ĉie por ŝin aresti.

Lin Qiaozhi ŝin demandis: "Kial dum tiel longa tempo vi ne volis infanon?"

La virino diris, ke ŝi vivis poste en ankoraŭ pli malfacilaj cirkonstancoj, ŝi devis militiri kaj batali, kaj ŝi estis tiel okupata, ke ŝi ne havis tempon por kuraci sian kronikan malsanon. Tial ŝi ne plu naskis infanon...

Tion aŭdinte, Lin kortuŝiĝis. Jen antaŭ ŝi sidis virino, kiu plene sin dediĉis al la revolucio. Ŝi travivis ĉiajn malfacilojn kaj oferis ĉion, inkluzive de la rajto patriniĝi. Mankis al Lin Qiaozhi kompreno pri politikaj aferoj, tamen ŝi eksentis pretervole estimon al tiu virino pro ŝia nobleco.

Post la diagnozo, ŝi respondis la demandojn de la pacientino kun koro plena de respekto kaj beno.

En la sekvanta tago, iu demandis ŝin: "Ĉu vi konas la pacientinon venintan hieraŭ?"

Ŝi skuis sian kapon nebule.

"Ŝi estas Deng Yingchao, la edzino de Zhou Enlai!"

Kaj en tiu momento, Deng Yingchao telefonis al ŝi: "Doktorino Lin, dankon pro via ekzameno al mi, dankon pro via prizorgo. . ."

Ŝi demetis la aŭdilon kun forta emocio. Kiel afabla Deng Yingchao estis! Kaj tiamaniere ŝi konatiĝis kun estimata fratino* Deng.

Post kelka tempo, ŝi ricevis invitilon petantan, ke ŝi kaj kelkaj aliaj kuracistoj de la Unia Hospitalo iru kunveni en Huairan-halo de Zhongnanhai.

Je mencio pri kunveno, ŝi ĉiam sentis iom da malagrableco. En tiu tempo cirkulis, en la malvasta mondo de la Unia Hospitalo, multaj kalumnioj kontraŭ la Kompartio kaj la popola registaro, kiel ekzemple la komunistoj kunvenas multege, tro longe la kunvenantoj devas atendadi kaj la kunvenoj daŭras tre tre longe. Por ŝi, ŝparema je tempo pro sia profesia kutimo, kunveno estis peza ŝarĝo. Kiam ŝi veturis per aŭto al la kunvenejo, ŝi aspektis laca.

Estis decidite komenci la kunvenon je la 3-a posttagmeze. Post kiam ŝi kaj ŝiaj kolegoj eniris la kunvenejon kaj apenaŭ sidiĝis, subite aŭdiĝis sonora voĉo sur la podio: “Bonvolu sidiĝi. Nun komenciĝas la kunveno!” Sur la podio staris viro kun nigraj densaj brovoj kaj brilaj okuloj, kiu ĉirkaŭrigardis la ĉeestantaron kun facila koro. Li estis ĝuste ĉefministro Zhou Enlai, estimata de la tuta ĉina popolo.

Lin Qiaozhi instinkte ekrigardis sian horloĝon — estis ĝuste la 3-a. Tuj ekscitiĝis ŝia tuta animo kaj ŝi voĉe aŭdigis sian penson: “Ho, mi ja ne atendis, ke la komunistoj estas tiel akurataj; verŝajne fidebla estas ilia gvido!”

Ŝi diris sufiĉe laŭte, kaj krome ŝi sidis en la unua vico, tial ŝin aŭdis la sidantoj en la ĉirkaŭaĵo. Iuj ekridetis kovrante al si la buŝon, aliaj ĵetis al ŝi riproĉan rigardon.

Tro naiva opinio, kaj dirita en tiel nekonvena loko! Sed, pardonu ŝin, ĉar ŝi ja ĝuste tiel pensis kaj malkaŝe diris sian penson. Ĝuste per sia intuicio ŝi iom post iom konis la grandan Kompartion kaj la novan socion. Kiam tiu intelektulino kun aĝo de ĉ. 50 jaroj faris sian unuan novan paŝon, ŝi paŝis ŝanceliĝe kaj aminde kiel infano, kiu eklernas paŝadon!

Pli poste, fratino Deng multfoje gastigis ŝin en sia hejmo kaj iom post iom ŝi konatiĝis kun ĉefministro Zhou kaj fratino Deng. Ŝi vidis propraokule scenojn de la ĉiutaga vivo de tiu eminenta familio. Ĉefministro Zhou estis tiel okupata ĉiutage, ke li ofte haste prenis sian simplan matenmanĝon starante ĉe tablo, kaj tuj post demeto de la pelvo li surmetis sian jakon kaj foriris haste. Rigardante la forirantan ĉefministron kaj la respektindan kaj amindan fratinnon Deng, ŝi havis novan komprenon pri politiko,

solviĝis ŝia fremdeco al politiko. Ŝi sentis, ke tia politiko alportos feliĉon al la tuta popolo; ŝi ĝojkriis kore: Ĉinio jam havas vere bonan ĉefministron!

IV

La popola registaro transprenis la Unian Hospitalon kaj faris patriotisman edukadon al intelektuloj. La partia organizo analizis la personaron de la Unia Hospitalo kaj konstatis, ke Lin Qiaozhi, estrino de la ginekologia-obstetrika sekcio, estas honesta virino kun simpla vivhistorio, kaj esperis, ke ŝi donos bonan ekzemplon en la ideologia reformo al la malnovaj intelektuloj de la tuta hospitalo.

Jen politiko trafis ŝin. Persone partopreni kaj ĉeflanke rigardadi ja ne estas egale por ŝi. Ŝi neniel povis solvi por si jenan demandon: “Fremduloj helpis nin en kulturado de laborantoj, kaj ankaŭ mi mem lernis mian arton de ili, sed nun oni volas ke mi publike parolu kontraŭ ili, ĉu tio ne signifas detruiri la ponton post transiro de la rivero**?...” Ŝi eldiris kion ŝi pensis, kaj serioze sendis sian rezignon al la hospitalestro.

Ŝi revenis al sia hejmo, sidis kun malkvieta koro sur la ŝtupetaro ĉe la pordo de sia malgranda etaĝdomo, gapante al la arbo en la korto. Dekojn da jaroj tiu arbo akompanadis ŝin. El sia kvieta ĉambreto, ŝi povis ĝin rigardi tra la fenestro kaj vidis ĝin verdiĝi ĉiujare en printempa zefiro. Kiom da konsolo ĝi donis al ŝi en ŝia fraŭlina vivo, sed tiumomente ĝi fariĝis por ŝi objekto de ĉagreno. Dum dekoj da jaroj ŝi klopodis por teni sin pura, pura kiel blanka floro de blanka magnolio (*Michelia alba*), do je kio ŝi ankoraŭ devas esti reformita? “Ve, estas vere maljuste aserti, ke mi ricevis influon de fremduloj. Mi eĉ malŝatas porti ledŝuojn pro ilia pezo kaj portadis tolajn ŝuojn dum dekoj da jaroj. . .”

En tiu movado, la Partio faris zorgan ideologian laboron, kaj gvidanta kamarado faris korversan interparolon kun ŝi. Kun longa vizaĝo kaj deturnita trunko ŝi diris: “Vane vi parolos kun mi. Mi ne estas tiel facile persvadebla kiel la junuloj. La junuloj similas al blanka papero, sed mi al papero plena de vortoj.”

“Ho jes,” la gvidanta kamarado ekridetis, “sur via paperpeco estas multaj vortoj, kaj iuj el ili estas tre bonaj!”

Varmo trafluis ŝian koron. Ŝi jetis rigardon al la gvidanta kamarado de partia organizo — en liaj okuloj disradiantaj je sincereco estis neniom da malico! Ŝi ne plu intence deturniĝadis kaj sentis ke tiu kamarado estas tre prudenta.

Kelkajn tagojn poste, en ŝian kabineton venis junulo. Li sin tenis tre ĝentile kaj parolis malrapide. Estante nur pli-ol-dudekjara li jam portis malmiopajn okulvitrojn.

“Sekciestrino Lin, kial vi ne fondis familion en via juneco?”

“Profesia afero kaj familio ne estis samtempe haveblaj por mi.”

“Ĉu vi pripensis tion? Kial tiuj kiuj regis la malnovan Unian Hospitalon povis havi ambaŭ, dum vi ne?”

Tiun demandon ŝi neniam pripensis kaj ŝi ne povis tuj respondi. Vidante ke estas neeble daŭ-



Ilustrita de CHEN YUXIAN

rigi la interparolon, la junulo ne plu demandis kaj post kelkaj tagoj li trovis novan temon de interparolo.

Kun profundigo de la movado, la diversaj sekcioj de la hospitalo malkaŝis grandan kvanton da malbonoj faritaj kaj Lin Qiaozhi komencis dubi sian konon.

Ŝi neniam provis beligi sian konon, tamen, kiam aliĝis ŝia konvinkiĝo, ŝi tuj eldiris sian veran penson. Tia estis ŝia karaktero, karaktero de honesta intelektulo. Kaj ŝi meminciate petis permeson de la gvidantoj fari paroladon en kunveno.

En kunveno de la tuta personaro de la hospitalo ŝi faris sian unuan paroladon sur la podio. Per simplaj kaj sinceraj vortoj ŝi resumis la pasintan duonon de sia vivo. Ŝi parolis pri sia naiva idealo en la juneco, pri la kruela ekspluatado de la malnova Unia Hospitalo al kuracistino kia ŝi, pri sia neplenumo de la promeso ĉeesti geedziĝan feston de ŝia kunlernanto, pri virinoj kaj infanoj multe suferantaj en la malnova socio... La torento de vortoj ekcitis la koron de ĉiuj ĉeestantoj. Ŝi diris kun plena justeca sento: “Nun mi fine vidas klare, ke mi devas transpasi la riveron kaj detruigi la ponton!” Ŝiaj maljunaj kolegoj falis en mediton. Dramisto Cao Yu, kiu estis tie por profunde koni la vivon, kortuŝiĝis ĝis larmoj, iris renkonte al ŝi kaj manpremis kun ŝi. Junaj medicinaj laborantoj konkure torentis al ŝi, levis ŝin super siajn kapojn kun ĝojego kaj jetis ŝin en la aeron. La kunvenejo, la pordoj kaj fenestroj skuiĝis antaŭ ŝiaj okuloj. Ekstere de la fenestroj estis blue blua ĉielo!

Ŝi publikigis artikolon sur la Popola Ĵurnalo kun la titolo: “Rigardo al la Patrolando post Malfermo de la Fenestroj de la Unia Hospitalo”.

Pri Lin Qiaozhi post tio oni ofte diris jene: “Ho, ŝajne ŝi subite ‘grandiĝis!’”

Ŝi fariĝis parolema kaj ridema. En la ginekologian-obstetikan sekcion venis por labori multaj kamaradinoj, kiuj tre amis sian laboron. Kiam ŝi vidis, ke iu el ili jam atingis edziniĝan aĝon, tamen vivas fraŭline, ŝi tuj klopodis por trovi fianĉon por ŝi kun tia maltrankvilo, kian eĉ la koncernatino mem ne havis.

“Nu, kial vi ankoraŭ ne edziniĝis? Ne perdu tempon!”

“Ankaŭ vivi fraŭline estas bone, kaj vi mem tiel vivas, ĉu ne? . . .”

“Nepre ne imitu mian ekzemplon,” ŝi diris mansvingante. “Tute malsama estas mia kazo, tro malfruis por mi la liberigo!”

Per sia tuta animo ŝi komprenis la signifon de la vorto “Liberigo”. Sur malplena muro en ŝia ĉambro aldoniĝis, oni ne scias kiam, eleganta

vitrita kadro kun bildo pri la solena inaŭguro de la Popola Respubliko. Tiu epokfara brila sceno ja havis apartan signifon por ŝi. Silente ŝi rigardadis ĝin, pie purigis ĝin per tuko, kvazaŭ foriganta ĉiun polveron de sur sia koro, foriganta la eternan penton profunde en sia koro. . .

(Daŭrigota)

* La vorto “fratino” estas uzata de ĉinoj por esprimi intimecon kun virino.

** Ĉina popola diro signifanta perfidon.

KALEJDOSKOPON

KOLOMBO-ARBOJ EN ĈINIO

La kolombo-arboj (*Davidia involucrata*) estas dekoracia arbo famkonata tra la mondo. Antaŭ ĉ. miliono da jaroj, la arboj kreskis en multaj lokoj de la mondo. Sed en la kvaternara periodo de glaciriveroj ili malaperis en preskaŭ ĉiuj lokoj. Ĉar tiam la glaciriveroj en Ĉinio estis malsame lokitaj ol tiuj en Eŭropo kaj Ameriko, tial tiaj arboj povis feliĉe postvivi kaj generi sur Fanjing-monto de Guizhou (Guj-ĝou)-provinco, Shennongjia de Hubei-provinco kaj gubernioj Emei kaj Ebian de Sichuan-provinco. Tial la arboj estas kromnomita “vivanta fosilio”. Ĝi distingiĝas per belegaj floroj similaj al kolomboj sidantaj sur la branĉoj kaj pro tio ĝi ricevis la kromnomon “kolombo-arbo”.



Kolombo-arbo

En aprilo de 1954, ĉefministro Zhou Enlai vidis arbidojn en iu korto en Ĝenevo. Informiĝinte, ke ili devenis de Ĉinio, li postulis ĉinajn forstokulturistojn esplori kaj kultivi la arbojn. Post multfojaj eksperimentoj de niaj forstokulturistoj en la lastaj jaroj, la kultivado de la arboj akiris grandan disvolviĝon en la forsto-regiono Shennongjia.

BREDADO DE RARAJ ANIMALOJ EN LA REGIONO DE FANJING-MONTO

La esploristoj pri animaloj de Guizhou-provinco bredis nombron da raraj animaloj en la regiono de Fanjing-monto. Inter ili estas la rara griza silksimio aparte protektata de nia lando, bebfiŝo, kiu estas la plej granda amfibio de Ĉinio, kanabeno kaj aliaj 10 specoj de raraj bestoj, kiaj moskulo, nubleopardo, sudĉinia tigro kaj makako.

Fanjing-monto estas la ĉefpinto de la montaro Wuling, kiu serpentumas ĉe la limregiono de la tri provincoj Sichuan, Hunan kaj Guizhou. Tiu montaro estas unu el la naturaj protektejoj de nia lando kun milda klimato, sufiĉa precipitaĵo kaj densaj arbaroj. Tie vivas multaj sovaĝaj animaloj. Unu el ili estas la griza silksimio, alta je ĉ. 1.3 metroj kaj havanta voston longan je unu metro. Tia simio neniam montriĝis en la zoologiaj ĝardenoj de la mondo.

23 JAROJ PER KAJ POR ESPERANTO

(Daŭrigo)

2

Mi neniam pensis ke mia poezia verkado en Esperanto kaj miaj malsamaj vidpunktoj rilate al politiko kaj belarto fariĝis mia “kontraŭrevolucia krimo”! Tio kostis al mi 15-jaran enkarceradon!

Vespere de la 20-a de aprilo de 1968, policistoj traserĉis mian ĉambron, mankatenis min kaj kondukis per ĵipo al distrikta policejo, kie oni devigis min konfesi mian “krimon”. Mi malkaŝe elskribis miajn opiniojn pri ĉiaj maljustaĵoj kaj mistraktoj al popolanoj, malrespekto al eksterlanda kulturo, eĉ al nia propra kaj kultura despotismo fare de Jiang Qing k. a. Fine, en nov. de 1969, post 19 monatoj en detenujo de la policejo, mi estis kondamnita al 15 jaroj da karcero. Iom poste, pro miaj paroloj pri vivo en eksterlando ktp., mi estis denove kondamnita al 5 jaroj plu. Do, entute 20 jaroj!

Dufoja kondamnado pli senesperigis min. Ĉu mi povos elteni 20 jarojn? Ĉu mi povos elkarceriĝi vivanta? Ĉu mi povos rekomenci mian por-esperantan laboron? Esperanto, nur Esperanto estis mia centra penso. Sed mi povis nenion fari por Esperanto. Ekpensante pri tio, mia koro ekstremis dolore. Svarmis en mi poeziaj inspiroj, miksitaj kun miaj doloroj kaj indignoj. Fakte, ekde komenco de mia malliberiĝo mi daŭre versis esperante, ĉizis, poluris miajn versojn nur en cerbo, eĉ troviĝante en katenoj kaj en ĉelo. E-poezikreado donis al mi grandan ĝojon kaj konsolon kaj kuraĝon alfronti la kruelan realon. Aliflanke, laŭ mia peto, mia patrino sukcesis alporti al mi EPĈ-n. Mi avide legadis. Sed kiu scias, kiom da obstakloj mi venkis ĝis la plej terura malsano-hemiplegio atakis min. La 21-an de junio de 1975 mi paralizigis unuflanke. Mi kapablis nek moviĝi nek paroli libere.

En tiuj teruraj tagoj kaj noktoj, mi pensis pri multo, pri mia estonta vivo, pri mia povra panjo kaj — pri mia plej amata Esperanto. Certe mi mortos, tamen Esperanto devas daŭre plu vivi. Mi estas jam en mallibero, en katenoj. Sed en tiaj cirkonstancoj kiamaniere disvastigi Esperanton? Jam en 1971 mi verkis 10-paĝan ĉinlingvan broŝureton pri Esperanto, kiu cirkulis inter malliberuloj. Inter ili mi ofte parolis pri Esperanto kaj ĝia kreinto Zamenhof. Post mia malsaniĝo en 1975, mi ekkonsciis ke por mi la plej efika rimedo por propagandi Esperanton estas instruado. Ĉirkaŭ mi estis kelkaj lernemaj junuloj interesiĝantaj pri Esperanto, mi tuj varbis du por lernado. En malliberejo estas absolute malpermesite uzi fremdajn lingvojn kaj transdoni eĉ slipojn. Mi kompilis lecionojn kun gramatiko ĉinlingve duonkuŝante surlite kaj ĉiu leciono estis envolvita en tualetpaperon kaj mi ĝin transdonis unufoje semajne en necesejo. Dum renkonto ni iomete kaj mallaŭte interparolis esperante kaj mi iomete korektis liajn erarojn. Tiamaniere post du monatoj li jam skribis al mi la unuan E-leteron. Mi instruis E-on en 1975 kaj 1979.

En okt. de 1976 la kvarpersona bando estis malkaŝita kaj renversita. Nur tiam mi eksciis ke ĉiuj mistraktoj kaj maljustaĵoj direktitaj al popoloj estis faritaj laŭ ordono de la kvarpersona bando. Prezidanto Hua Guofeng komencis gvidi la Partion kaj la registaron. La printempo de niaj belarto kaj scienco venis. Kiel malliberulo mi aspiris al liberiĝo kaj sindediĉo al nova vivo.

Fine, kiel miraklo, la Popola Kortumo deklaris min tute senkulpa je la 19-a de jan. de 1979 kaj mi estas tute libera ekde tiu tago — la tago de mia renaskiĝo kaj komenciĝo de la nova vivo! Pro ĉio ĉi tio mi ŝuldas eternan dankon al la Centra Partikomitato kaj Prezidanto Hua Guo-

feng! Miaj okuloj malsekiĝis de dankaj lar-
moj...

3

Ekde la tago de mia liberiĝo, mi jam faris laborplanon por Esperanto (verkado, tradukado kaj privata instruado ktp.).

Pri mia liberiĝo, mi tuj skribis al UEA. D-ro V. Sadler tuj reakceptis min kiel membron ĉe Canuto-Fondaĵo, kaj s-ro S. Milojeviĉ afable publikigis informon pri mi en n-ro 4 de "Esperanto", tial mi ricevis amason da gratulletoj kaj presaĵojn. Tio donis al mi grandan ĝojon. Mi ne estas forgesita de la verda mondo! Pluraj min serĉadis tra diversaj vojoj kaj petis informojn pri mi ĉe UK. D-ro Adriano Madaro, fama itala ĵurnalisto kaj mia intima amiko de 19 jaroj (granda simpatiulo de nia lingvo kiu favore menciis Esperanton en pluraj itallingvaj artikoloj pri mi), eksciinte pri mia liberiĝo, li, kiel membro de Itala Delegacio de Ĵurnalistoj, venis speciale al Tianjin. Raportis la Ĉina Novajagentejo al tutmonda gazetaro ĉinlingva de elmigrintaj ĉinoj pri nia renkonto kaj pri mia unua itallingva poemaro "Poesie dalla Cina" ("Poemoj el Ĉinujo") eldonita en Italio sub redakto de D-ro Madaro.

Antaŭ nelonge, aŭstralia esperantisto, la dua sekretario de la Aŭstralia Ambaskado s-ro Daniel Kane speciale vizitis min en Tianjin kaj ni longe interparolis pri la amikeco inter Ĉinio kaj Aŭstralio kaj pri Esperanto.

Armand Su (meze) helpas junulinojn en ilia lernado de Esperanto.




Por la unua fojo la enlanda gazetaro montris al mi grandan simpatian, ankaŭ miaj poresperanta agado kaj poezikreado estas juste taksitaj. La loka tagjurnalo "Tianjin Ribao" publikigis tutpaĝan literaturan raportadon pri mi (kun foto) "Ekbrilanta Nova Stelo" (27/4/1979) kaj post du tagoj, en la plej granda kultura tagjurnalo "Guangming Ribao" el Beijing aperis longa korespondado pri mi (kun foto) kaj redakcia laŭda artikolo pri mi. Samtage, la Centra Popola Radio de Pekino koncize deklamis la korespondadon dufoje en novaĵ-programo por la tuta lando. Ankaŭ la ĵurnalo "Ĉina Junularo" raportis pri mi. Esperanto estis aparte akcentita en ĉio ĉi tio kaj vekis grandan intereson ĉe tutlanda legantaro. Alfluis pluraj leteroj el la tuta lando kun informpetoj pri Esperanto. Ĉio ĉi tio igis min verki artikolojn pri Esperanto por la tagjurnalo "Tianjin Ribao" kaj la junulara revuo "Heilongjiang Qingnian" ktp. kaj la Tianjin-a Popola Radio disaŭdigis artikolon pri Esperanto verkitan de s-ano Wu Zhenxiang (Sizhvo). Ĉio ĉi tio estas nia gajno por E.!

Ĉinaj tradukoj de miaj esperantlingvaj kaj itallingvaj poemoj aperis en la plej grava ĉina poezia gazeto "Shikan" kaj aliaj literaturaj revuoj. La Popola Literatura Eldonejo estas preta eldoni mian poemaron en ĉina traduko.

En junio min intervjuis Esperanto-Sekcio de Radio Pekino kaj surbendigis mian paroladeton kaj poemdeklamadon en Esperanto. Ankaŭ ra-

Armand Su kaj geesperantistoj



portistoj de EPC min vizitis. Mi sentas min tre feliĉa ke esperantistoj de mia lando montras al mi tiom da amikeco.

La 24-an de junio, en la Municipa Biblioteko ni deko da esperantistoj de Tianjin okazigis la unuan kunvenon. Ĉeestis la vicestro de la literatura kaj arta sekcio sub la propaganda departe-

mento de la Tianjin-a Urba Komitato de KPC Wu Hu kaj la famaj tianjin-aj esperantistoj Li Laorong, Sizhvo k.a. Ni ĝoje babilis kaj diskutis pri disvastigo de Esperanto en nia urbo.

La Partio montras grandan zorgon pri mia malsano. Laŭ aranĝo de la Tianjin-a Urba Komitato de KPC mi enhospitaliĝis senpage en



ARMAND SU:

KANTO DE L' NIGRAJ MINISTOJ

*Ni ŝvitas, ni anhelas en obskuro,
sen lumo, sen aer', en malsekuro.
Nin kovras tute la malpuraj farboj.
Ni estas nigraj, kiel samaj karboj.*

*Pli kaj pli grasa iĝas la patrono,
kiu sin nutras per profita mono,
plenmakulita de la sang' skarлата
de niaj fratoj en la mond' malsata.*

*Ne devas daŭri tia viv' malluma,
kaj nin ne logas la Eden' posthuma.
La falsa Di-promes' ne plu nin trompos.
Ĉion maljustan pugne ni disrompos!*

*L' indigna flamo en l' okuloj ardas,
kaj la doloro nian volon hardas.
El sub la spirsufoka tera krusto
leviĝos ni kun plenlevita brusto.*

*Ni unuigu, povraj homaranoj,
kaj liberigos nin per propraj manoj.
Frakasos ni la pordon de l' Infero,
kaj nin proklamos mastroj de la tero!*



marto. Ĝis mia elhospitaliĝo en junio mi ne ĉesis labori por Esperanto. Mi faris propagandon pri Esperanto inter kuracistoj kaj flegistinoj, kaj varbis kelkajn por nia lingvo.

Nun mi ankoraŭ ne komplete resaniĝis, tamen en mi arde flamas la deziro tuj min ĵeti al laboro, al kvar modernigoj de la patrio kaj al Esperanto. Krom poeziverkado, mi nun verkas ĉinling-

van gramatikon de Esperanto kaj partoprenas en la eldonota "Nova Esperanta-Ĉina Vortaro".

Post frakasiĝo de la kvarpersona bando, venis ankaŭ la printempo de Esperanto en nia lando. Mi ĝin bonvenigas per pli energia laboro por la triumfo de Esperanto en Ĉinio!

(Fino)



AL NIGRAJ RIBELULOJ

*Sur la ter' de l' nigra kontinento
nun ribelas l' indiĝena gento
por la homaj rajtoj kaj viv-frukto,
tra la vojo de l' armita lukto.*

*Kiom da jarcentoj en mizero
baraktadis vi en kor-sufero
sub la jugo de l' patronoj blankaj
kaj skurgado de la manoj sangaj.*

*Vane vi preĝadis ĉe l' altaro.
Dio ne kompatas la sklavaron.
Vi ne fidu plu al ĉi idolo.
Via Dio estas la popolo!*

*Vi ribelas, subpremataj sklavoj,
bravaj idoj de l' proletaj avoj.
Tempas nun frakasi la katenojn
kaj disrompi l' malbenatajn ĉenojn!*



Ilustrita de NING CHENGCHUN





Pikniko

---- NOTOJ PRI VOJAĜO EN JUGOSLAVIO

de Ye Junjian



La aŭtoro kune kun
jugoslava junpioniro

LAŬ la klimata normo de Eŭropo, la dua tagdeko de majo estas floranta printempo precipe en la Slovenia Respubliko de Jugoslavio kuŝanta najbare al Italio kaj Aŭstrio. Ĝi situas ĉe la rando de la suda kaj meza Eŭropo kaj ĉe la fino de la okcidenta parto de la Alpoj. Ĝia klimato apartenas al varmeta zono de Eŭropo. Printempo de tiu loko ja estas milda. Escepte de la neĝo sur malproksimaj montpintoj de la okcidenta parto de la Alpoj, ĉie prosperis verdaĵoj kaj eĉ sur krutaj rokmuroj kreskis arbustoj kaj herboj. Ni, verkistoj el pli ol 20 landoj, veturis, post matenmanĝo, en du turismaj aŭtobusoj al la profundaĵo de printempo, akompanate de reprezentantoj de jugoslavaj verkistoj.

Nia deirpunkto estis la pitoreskejo Bled de la Slovenia Respubliko, kie okazis la Internacia Konferenco de Verkistoj*. En la lasta tago de la konferenco, nia mastro — la Verkista Asocio de la Slovenia Respubliko kaj la Slovena Plumbocentro — aparte organizis tiun ekskurson. La celloko estis herbejo de

monta komunumo. La gvidanto de tiu ekskurso estis la prezidanto de la Internacia Konferenco de Verkistoj kamarado Bogdan Pogaĉnik. La aŭtobusoj veturis ne tre rapide sur asfalta ŝoseo etendiĝanta al montoj, tial ni povis ĝue rigardi la pejzaĝojn ambaŭflanke de la ŝoseo.

Niaj aŭtobusoj haltis ĉe pontokapo, de kie ni devis piediri. Ni iris en kanjonon kaj paŝis sur vojo hakita sur rokmuro. En la kanjono fluas klara torento. Kiam la fluo inter la rokmuroj ruliĝis antaŭen, la ŝaŭmantaj ondoj ĵetiĝis alten. La aero kaj la ondoj kunfrapiĝis en nebulo. Ni iris en nebulo, povis distingi nur la vizaĝon kaj aŭdi unu alian. Tiel kunfandiĝis la kanjono, rokmuroj, torento, nebulo kaj homvoĉoj kaj ni kvazaŭ ŝvebus en la aero. Tiu miraklo de la naturo kaj la "danĝero" kaŭzita de ĝi sentigis al mi, ke tiu ekskurso estas vere neordinara.

Tagmeze, ni venis al la montsupro. Antaŭ ni sterniĝis malgranda herba ebenaĵo simila al paŝtejo. Je 50-60 metroj fore de ni, ŝajne estis abatiso, eble ŝafstalo. Sed en ĝi

troviĝis neniu bruto kaj moviĝis nur homaj siluetoj. Tuj poste ni vidis kamaradon Pogaĉnik, kaj demalproksime li mansvingis al ni. Fakte ĝi estis la loko por pikniko kaj la siluetoj estis la verkistoj pli frue alvenintaj. Ĉe angulo en la "ŝafstalo" leviĝis fumstrioj de kuirado.

Ĉe breĉo de la abatiso staris vilaĝa junulino en brilkolora nacieca kostumo, tenante faskon da floroj. Ŝi fiksitis al ĉiu eniranto po unu floron surbruste. En la nomo de la lokaj loĝantoj en najbaraj arbaroj, ŝi esprimis al ni bonvenigon. La fumstrioj eliĝis el la bakfornoj kiujn vilaĝanoj provizore instalas. La mastroj estis bakantaj por la gastoj lokajn kolbasojn kaj dikajn porkostekojn. Tie estis neniu servisto, kaj ĉiu gasto povis mem preni teleron kaj ricevi sian porcion ĉe la bakforno. La pikniko ja estis neordinara. Tio montris, laŭ ni fremdlandaj gastoj, ne nur riĉecon de tieaj vilaĝanoj, sed ankaŭ ilian afablecon al ni.

En pli malproksima loko troviĝis laŭbo, kie muzikisto en nacieca

kostumo ludis dancajn melodiojn per akordiono. Iuj vigloplenaj amikoj, incitite de la gajaj melodioj, demetis la glason kaj teleron kaj unu post alia invitis sian konaton aŭ konatinon al dancado. En alia pli malproksima loko estis vilaĝa domo, kie oni povis aĉeti trinkaĵon. Kelkaj laboristoj tie interparolis gaje kun larĝaj gestoj. Mi ne sciis, ĉu ili preparolas nin, gastojn el fremdaj landoj. Sed la sceno altiris min, kaj mi iris tien. Neatendite, ankaŭ kamarado B. Pogaĉnik, prezidanto de la Slovena Plumo-centro, kaj ĝia sekretariino Elza Jereb drinkis tie, do ili sendube preparolis nin. Iu altastatura mezaĝulo, vidinte min alproksimiĝanta, jam divenis, ke mi estas ĉino. Li etendis al mi sian manon kun vinglaso kaj ni tostis brakon en brako. Poste mi informiĝis, ke li estas direktoro de iu fabriko kaj deveninta de laboristo. Ankaŭ la sekretariino Elza englutis glason da vino. Kaj ŝi petis, ke mi revenu al la laŭbo por danci kun ŝi.

Ĉiu ĉeestanto estis senĝena kaj entuziasma. Tio fakte estis la lasta renkontiĝo de la verkistoj de la konferenco. Dank' al la gastamo de la jugoslavaj mastroj, la verkistoj de pli ol 20 landoj havis la ŝancon ĝui gajecon en tiu loko kun aparta gusto. Malgraŭ tio, ke ili havas malsamajn opiniojn pri la literaturo kaj malsaman praktikon en verkado, kiel verkistoj ili havas komunan celon, ke la homaro havu belan estontecon. Ili ĉiuj volas fari sian kontribuon tiuflanke. Tio estis la komuna lingvo, la akcentita punkto de ĉiuj ĉeestantoj de la konferenco. Bedaŭrinde la tagordo de la konferenco estis iom kunpremita, tial la "komuna lingvo" ne povis esti plene interŝanĝita. Ni havis nek ŝancojn nek tempon por sufiĉe interparoli kun ĉiu verkisto. Sed la pikniko certgrade riparos tiun mankon.

Kiam mi sidiĝis ĉe longa tablo kaj aprecis la bonodorajn kolbason kaj porkostekon, slovena verkistino Nada Kraigher, sidanta kontraŭ mi, diris al mi:

"Ĉu vi interparolis kun sovetuniaj verkistoj en la konferenco?"

"Ne," mi respondis.

"Ognev estas talenta verkisto. Li publikigis nemalmultajn verkojn. Lia kolekto de eseoj pri la Slovenia Respubliko estas aparte kortuŝa kaj la stilo tre bela. Vi devas interparoli kun li. Kaj vi eble trovos en li neordinarajn karakterizaĵojn. Ĉu vi konsentos ke mi invitu lin por interparoli kun vi?"

Verkistoj ja estas parto de la popolo, se ili estas veraj verkistoj, veraj "inĝenieroj de homa animo". En la konferenco, ni ĉiuj esprimis en niaj paroloj, ke ni subtenas tiun vidpunkton.

"Kial ne?" mi diris. "Ankaŭ sovetuniaj verkistoj devas aparteni al la sovetunia popolo."

"Bone, atendu do ĉi tie kaj ne foriru," diris Nada. "Mi venigu Ognev ĉi tien."

Momenton poste Nada revenis, kaj Ognev kune kun ŝi. Li sidis apud Nada vizaĝe al mi. Ognev estis mezaĝulo de ne alta staturado, dum parolo sinĝena rideto ludis ĉe liaj buŝanguloj. Kompreneble, nia "komuna lingvo" estis tre multa. La nova literaturo de Ĉinio kaj niaj revoluciaj verkistoj kun sinjoro Lusin ĉe la kapo ne nur ricevis la influon de la sovetunia literaturo post la Oktobra Revolucio, sed ankaŭ havis tre profundan rilaton kun la rusa realisma literaturo de la cara periodo. Eĉ kiam la "kvarpersona bando" praktikis faŝisman regadon super niaj literaturaj kaj artaj rondoj, nia kamarado Bakin tradukis "Pasinteco kaj Pensoj" de la rusa verkisto A. I. Herzen, en tre malfacilaj cirkonstancoj. Kiam ni interparolis pri tiuj aferoj, ni sentis neniom nekonatecon. Sed iuj verkistoj-amikoj el Eŭropo kaj Ameriko ne komprenis tion, ili rigardis la principajn malakordojn inter la partioj kaj registaroj de Ĉinio kaj Sovetunio kiel malakordojn inter la popoloj kaj verkistoj de la du landoj. La interparolo

(Daŭrigo sur p.24)

Intima konversacio inter la aŭtoro kaj diverslandaj verkistoj






LA UNUA SURMARA HIDROLOGIA-METEOLGIA STACIO DE ĈINIO

La unua surmara hidrologia-meteologia stacio senhoma estas starigita de Ĉinio ĉe 122° 9' E, 32° 32' N en la Flava Maro, proksime de la urbo Shanghai (Sanhajo), kaj jam komencis funkcii. Tiu stacio estas fiksita sur la maro per tri ankroĉenoj kaj povas aŭtomate mezuri kaj registri diversajn marajn hidrologiajn kaj meteajn fenomenojn kiel temperaturo, atmosfera

Surmara hidrologia-meteologia stacio en muntado



premo, kaj forto kaj direkto de vento.

NOVA FERVOJO EN QINGHAI-PROVINCO

En la lasta tagdeko de julio, finiĝis la trakometado por la unua konstrua periodo de la Qinghai-Tibeta Fervojo.

La konstruita fervoja parto en tiu periodo komenciĝas de Xining (Hining), la ĉefurbo de Qinghai (Kinghaj), kaj finiĝas ĉe Golmud. Ĝi longas 834.5 kilometrojn. Tiu fervojo tra Qaidam-baseno estas unu el la plej alte situantaj fervojoj en la mondo, kaj la trapasataj lokoj estas plejparte je 3,000 metroj super la mara nivelo. 350-kilometra parto de ĝi trapasas senakvan regionon kaj 32-kilometra parto estas konstruita sur sala lago, kaj unu el ĝiaj tuneloj kun longeco de 4 kilometroj estas konstruita en montego je 3,700 metroj super la mara nivelo. Tiu fervojo estas ekkonstruita en 1974, kaj ĝi fariĝos aorto interliganta la nordokcidentan parton kaj la sudokcidentan landliman regionon de Ĉinio, loĝatajn de nacimalplimulto.

NOVA DISTRIKTO DE KARAMAY-OLEKAMPO

Post tri-monata laboro plenumiĝis la unuaperioda konstruado de la nova oleprodukta distrikto Baikouquan de Karamay-olekampo en Xinjiang (Hingiang). Je la 1-a de julio, 30 novaj oleputoj oficiale komencis normalan produktadon. Baikouquan estas unu el la ĉefaj novaj oleproduktaj distriktoj konstruataj en tiu ĉi jaro. Kiam plenumiĝos la tuta konstruado, ĝia produktokvanto de nafto egalos al du trionoj de Karamay-olekampo antaŭ la jaro 1966.

NOVAJ OBLIKVAJ ŜAKTOJ DE FUSHUN-KARBOMINEJO

En la lasta tagdeko de julio, oficiale ekfunkciis paro da nove kons-

truitaj oblikvaj ŝaktoj de la Norda Longfeng-sekcio de la ĉina grava karboprodukta bazo Fushun-karbominejo. Tiu paro da ŝaktoj povas produkti 300,000 tunojn da bonkvalita karbo en ĉiu jaro. Post kiam ĝi interligiĝos kun ŝaktoj de la Suda Longfeng-sekcio, la jara produktokvanto de bonkvalita karbo por koakso de ambaŭ sekcioj atingos la ciferon de 2,000,000 tunoj.

Tiu paro da oblikvaj ŝaktoj estas projektita kaj konstruita de ĉinaj laborantoj. Hidraŭlika karboleva sistemo estas aplikita al ĝi kaj karbopecoj povas esti levitaj supren en tubo kun kalibro de 12 coloj rekte en la karboelektojn. Tiu sistemo estas pli altefika kaj estigas malpli multe da karbopolvo en la aero.

ELEKTRONIKA NASKO- MONITORO SUKCESE FARITA


Ĉinio sukcese faris lastatempe sian elektronikan naskomonitoron kaj komencis produkti tiajn aparatojn en malgranda nombro.

Tia aparato povas helpi obstetrikajn medicinistojn bone koni la evoluon de feto en la utero kaj la rilaton inter la pulsado de la feto kaj la kuntiriĝo de la utero, kaj juĝi ĉu al la feto mankas oksigeno aŭ ne. Apliko de tia aparato povas protekti la sanon de la fetoj kaj iliaj patrinoj. Praktika uzado pruvis, ke la nova aparato bone funkcias.



YONGLE-PALACO KOMENCIS AKCEPTI VIZITANTOJN POST TRANSLOKIGO

La fama ĉina antikva konstru-ajaro Yongle-palaco estas taoisma templo de Yuan-dinastio (1206 — 1368 p.K.). Antaŭe ĝi troviĝis apud la rivero Huanghe (Flava Rivero) en Ruicheng-gubernio ĉe la sudokcidenta angulo de Shanxi-provinco. En la kvindekaj jaroj, la registaro decidis konstrui la grandan akvo-konservejon ĉe Sanmenxia, kies akvo povus inundi la templon. Por konservi tiun imponan antikvan konstruaĵaron kun komplika strukturo, la registaro komencis ĝin translokigi en 1959 al pitoreska alta loko norde de la gubernia urbo de Ruicheng kaj finis tiun laboron en 7 jaroj. La translokita Yongle-palaco tute konservas sian originan formon. En la kvar haloj troviĝas tre belaj freskoj sur la muroj kun totala areo de pli ol 960 kvadrataj metroj.




Fresko sur la orienta muro de Sanqing-halo

3000-JARAJ TOMBOJ DE NACIMALPLIMULTOJ MALKOVRITAJ EN XINJIANG

Arkeologoj de la Arkeologia Instituto de Xinjiang malkovris naci-malplimultajn tombojn konstruitajn antaŭ pli ol 3,000 jaroj, en la dezerto proksime de Wubao-komunumo de Hami-gubernio. Materialoj trovitaj en 29 tomboj montras, ke tio estis klana komuna tombejo en la malfrua periodo de la primitiva socio.

Pro sekeco en la dezerto, multaj kadavroj en la tomboj estas bone konservitaj kaj la sekaj kadavroj kun haroj, karno kaj vestoj plejparte ne putriĝis. La mortintoj portis pintajn feltajn ĉapojn kaj botojn. La vestoj faritaj el lanaj teksaĵoj brilkoloraj aspektas elegante. En la tomboj troviĝis ankaŭ lignaĵoj, ŝtonaĵoj, argilaj vazoj, perlamotaj kaj bronzaĵoj ornamaĵoj kaj bronzaĵoj



Sanqing-halo, la ĉefa konstruaĵo en Yongle-palaco

tranĉiletoj. Krome, oni trovis en ili ankaŭ ostojn de bovo, ĉevalo kaj ŝafo kaj miliajn kukojn kaj ŝelojn de sekalo.

RELIGIA INSTITUTO FONDIĜIS EN NANJING-A UNIVERSITATO

Ĉijare, la Religia Instituto fondiĝis en la Nanjing-a Universitato. En simpozio okazigita antaŭ nelonge

en la universitato laborantoj de la instituto voĉlegis siajn disertaĵojn titolitajn per “Pilgrimo al Teismo” kaj “Kristanismo de la Tajping-a Ĉiela Regno”.

Nun, la laborantoj de tiu instituto estas verkantaj la librojn “Okcidentaj Religiaj Anekdotoj” kaj “Historio de Kristanismo en Ĉinio” kaj krome partoprenas en la redaktado

de la volumo pri religio de la preparata ĉina "Granda Enciklopedio".

En la estonteco, la Religia Instituto de la Nanjing-a Universitato disetendos sian esploradon al budhismo, islamo kaj taoismo. La instituto jam varbis esplorantajn studentojn.

EKSPOZICIO DE MODERNAJ RUMANAJ PENTRAĴOJ EN BEIJING


Por celebri la 35-an datrevenon de la liberiĝo de Rumanio, okazis en Beijing Ekspozicio de Modernaj Rumanaj Pentraĵoj, en kiu montriĝis 66 olepentraĵoj de 29 rumanaj pentristoj. La temoj de la ekspoziciitaj verkoj reprezentantaj diversajn skolojn estas tre diversaj. Interalie estas pentritaj belaj pejzaĝoj de norda Rumanio, sceno en la kamparo, laboro sur granda konstruejo, portretoj de nuntempaj socialismaj konstruantoj kaj portretoj de historiaj personoj. La ekspozicio ricevis multajn laŭdojn de la ĉinaj vizitantoj, precipe de la belartistoj.

TIBETLINGVAJ KLASIKAĴOJ REPRESATAJ KSILOGRAFIE

La Klasikaj-presejo de Dege en la okcidenta parto de Sichuan-pro-

vinco nun estas repesanta tibetlingvajn klasikaĵojn per bone konservitaj lignaj presplatoj, kies nombro superas 200,000.


La Klasikaj-presejo de Dege estas unu el la tri grandaj centroj de presado de tibetlingvaj klasikaĵoj en la ĉina historio. La aliaj du similaj centroj estas la Klasikaj-presejo de Potala en Lhasa kaj la Klasikaj-presejo de Nartang en Xigaze.



Libroj pri budhismo, historio, medicino, filozofio kaj poezio represitaj de la Klasikaj-presejo de Dege.

La enhavo de la presplatoj kun vortoj sur ambaŭ flankoj konservataj de la Klasikaj-presejo de Dege inkluzivas sutron, historiajn biografiojn, astronomiajn kalendarojn, medicinon, filozofion, gramatikon, poezion, metrikon, muzikon, belarton, skulpturon, metiojn ktp.

La nomita presejo jam havas historion de 250 jaroj. Ĝiaj presajoj estas klaraj kaj fame konataj kaj eĉ eksportitaj al Hindio, Nepalo, Bhutano, Japanio kaj aliaj landoj en Sudorienta Azio kaj Eŭropo.



La libro "Medicina", alinomata la "Kvarvoluma Farmakopeo", inkluzivas diagnozon, kuracilojn, klinikon kaj aliajn medicinajn notojn.

La Filharmonio de la Radiodisaŭdiga Ligo de Japanio prezentas en Beijing.



LA FILHARMONIO DE LA RADIODISAŬDIGA LIGO DE JAPANIO EN ĈINIO

Ĉisomere, la Filharmonio de la Radiodisaŭdiga Ligo de Japanio faris turneon en Ĉinio laŭ invito. Ĝi ludis japanajn kaj eŭropajn simfoniojn en Beijing kaj Guangzhou (Kantono), kaj kune kun la ĉina Centra Radiodisaŭdiga Filharmonio prezentis la Kvinan Simfonion de Betoveno. La prezentado de la japanaj muzikistoj havigis al la ĉinaj amasoj ŝancon ĝui belan muzikon.

La Filharmonio de la Radiodisaŭdiga Ligo de Japanio fondiĝis en 1926 kaj ĉiujare ĝi plenumas ĉ. 120 prezentadojn. Ĝi faris sian kontribuon en konigo pri la okcidenta muziko kaj akcelado de la disvolviĝo de muziko en Japanio.


KOREKTOJ POR N-RO 10

- P. 9, 12-a linio en la maldekstra kolono "1188" estu legata "118".
- P. 10, 9-a linio en la dekstra kolono "6466" estu legata "646".
- P. 52, 14-a kaj 19-a linioj en la maldekstra kolono "Zeopold" estu legata "Leopold". Ni multe bedaŭras pro tiu eraro kaj petas la pardonon de S-ro Leopold.

FOTOJ PRI LA ĈINA ESPERANTA LABOR-KUNVENO



Kunvenejo




Hujucz (dekstre) intime intervidiĝas kun esperantistoj venintaj el Hubei-provinco.




Rigardo de Esperantaj libroj kaj gazetoj

Du generacioj de junaj kaj maljunaj esperantistoj





Veteranaj esperantistoj ĝoje kolektiĝis.



Interŝanĝo de spertoj en lernado de Esperanto

Zhang Depu (la dua de maldekstre) kaj lia frato Zhang Deyuan (la tria de maldekstre) ambaŭ estas esperantistoj.



Ekskurso al parko



Junaj esperantistinoj



FOTOJ PRI NATU- RAJ BELAĴOJ FA- RITAJ DE E-ISTOJ

Malgranda plezurŝipo sur la rivero Rejno
de J. Kondor (FR Germanio)




Totemo en Loreno, Francio (farita el ruĝa cedro de Brita Kolombio de Kanado kaj donacita de la Kanada Aerarmeo)

de M. Jean Demissy (Francio)

Malnovaj muelejoj 15 km. norde de Amsterdamo, Nederlando

de A. Mantjes (Nederlando)




Fotografiaj Verkoj de Chen Fuli

Lastatempe la Ĉina Fotografia Asocio aranĝis en Beijing (Pekino) ekspozicion de verkoj de la fama Xianggan (Hongkong)-a fotografiisto Chen Fuli. Dum la lastaj jaroj Chen plurfoje vojaĝis en niaj diversaj lokoj kaj faris multajn artajn fotojn. Liaj fotografiaj verkoj estas originalaj en strukturo kaj riĉaj je poezieco. Precipe la tekniko montrita en liaj pejzaĝaj fotoj estas eminenta kaj lia stilo estas originala, kaj pro tio li famiĝis en kaj ekster Ĉinio. Jen kelkaj el liaj ekspoziciitaj verkoj.


Huangyangjie (sur la montoj Jिंगgangshan)






Prova Rajdo (en Xinjiang)

Zigzaga Rivereto en Aütuno (en la monto Wuyishan)





Neĝa Voĵeto sur la Monto Emeishan (en Sichuan-provinco)




Lerno pri stirado

Novaj amikinoj



Ascendo de Laoshan-monto




Soifo al scioj

Agrabla


la

Ĉisomere, reprezentantoj el la ĉinaj mez- kaj element-lernejoj venis al la marbordo de la urbo Qingdao, kaj kampadis tie por pasigi agrable la somerajn



Navigado

Ludo sur maro



Vivo dum

Someraj Ferioj

feriojn. Ili ĝojplene faris multajn aktivadojn, kiel naĝado, navigado, montogrimpado kaj amuza kunveno.

833

